


ESPERANTO

REVUO INTERNACIA



En la katedralo de Köln, Germanujo

N-ro 628 (3)

Marto 1958

**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)

W. Dastych

Fondinto: H. HODLER

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

Cion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro:
MAG. W. AULD, Knockfarril, Thornsidge Road, Johnstone,
Renfrewshire, Skotlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto
(abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C.,
Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la
redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la
1-a de la antaŭa monato

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke
oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1958): 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro
12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo 128,— gld $\frac{1}{2}$ paĝo 64,— gld $\frac{1}{4}$ paĝo 32,— gld
 $\frac{1}{8}$ paĝo 16,— gld $\frac{1}{16}$ paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj. **Legantoj en 80 landoj.**

Estrararo de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario 77, Grasmere Avenue
Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road,
London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban,
Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale
Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj,
Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono: ARNold 90-81.

Enhavo

Ĉu prefere nacilingvo?	37
La esperantlingva reklamo	37
Celstacio. C. Ostankowicz	39
Esperanto-movado en Litova SSR	43
La nibelungoj	45
Statistiko pri la membraro	46
Nova etapo de ĉina E-movado	48

Rubrikoj

43a Universala Kongreso	48
Monda galerio	40
Radio-babiloj	42
La internaciaj konkursoj	44
CED	44
Koresponda servo mondskala	46
La Juna Vivo	49
Oficiala informilo	51

Manuskriptoj por „Esperanto” devas esti klare taj-
pitaj sur unu flanko de la folioj, kun interlinia spaco,
en perfekta Esperanto kaj en du ekzempleroj. Ne-
uzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ
afranko aŭ respondkupono.

ĈU PREFERE NACILINGVO?

Lastatempe mi legis, en internacia junulargazeto, leteron de iu leganto, kiu (sen tro granda porcio da informiteco pri nia lingvo), skribis iom malŝate pri Esperanto. Li demandis, kial ne oni prefere „dediĉu la tempon kaj laboron necesajn por la studado de Esperanto... al studado de unu el la ĉefaj vivantaj lingvoj...”

Eĉ ignorante la fakton, ke la Internacia Lingvo estas precize unu el la „vivantaj” lingvoj (ĉar certe ĝin parolas pli da personoj ol parolas, ekzemple, la skotan gaelan lingvon — kiun ĝis nun neniu kuraĝis nomi mortinta!), oni povas redoni, kaj milfoje jam redonis, multajn respondojn; tamen hodiaŭ mi deziras limigi min al unu respondo, kiun, verŝajne pro ĝentileco, oni ankoraŭ ne tro ofte pritraktis. La ĝentileco estas honorinda, tamen foje estas utile, diri klare kaj nemiskompreneble kelkajn aferojn.

Mi estas denaska posedanto de unu el tiuj „ĉefaj vivantaj lingvoj”, al kiuj kelkaj personoj destinas la rolon de „internacia” lingvo. Kaj mi deziras fine registri publike la fakton, ke mi tre malŝatas aŭskulti alilandanojn, kiuj dediĉis multajn jarojn al la studado de tiu lingvo, ĝin mistraktantaj, tordantaj kaj torturantaj. Min jam tede, elektadi mian vortprovizon konforme kun la elementaj kapabloj de eĉ sufiĉe „progresintaj” parolantoj; aŭskulti, kaj legi, iliajn groteskajn gramatikajn erarojn kaj ilian malbelegan prononcadon; al mi jam sufiĉis malfluaĵoj pro manko de kapablo esprimi profundajn pensojn per fremda lingvo, alilandana miskompreno de miaj idiomoj kaj la rigida maltrafeco de iliaj.

Kelkfoje mi aŭskultis, kun ĉagrena amuziĝo, du alilandanojn, kiuj interparolis en lingvo, kiun ili kredis la angla; tio pensigis min, ke la angla lingvo estas taŭga internacia interkomprenilo por ĉiuj — krom denaskaj angle-parolantoj!

Aliflanke, kiam mi mem parolas la francan, kiun mi studis en universitato, kaj kiun mi legas tute flue, mi suferas turmentojn, ĉar mi tre konscias la mankojn de miaj franclingvaj konoj, kaj ĉar mi neniam povas esti tute certa, ke mi diras precize tion, kion mi deziras diri...

Kun Esperanto — ĉu necesas diri tion? — nenio simila okazas. Parolante Esperanton, oni renkontiĝas sur egala, neŭtrala tereno; kaj tio, mi ne hezitas aserti, neniam okazas inter tiuj, kiuj parolis denaske iun naciajn lingvon kaj tiuj, kiuj lernis ĝin pli poste en la vivo. Dum tridek jaroj mi renkontis nur unu „alilandanon” (vorto, kies angla traduko posedas malagrablajn nuancojn, kiujn ne havas la esperanta vorto), kiun mi estus supozinta denaska angle-parolanto — kaj li estis loĝinta en Britujo dum pli ol dudek kvin jaroj.

Naciaj lingvoj taŭgas por samnaciaj lingvoj. Esperantistoj ne celas detrui tiujn lingvojn; estas precize tiuj, kiuj volas trudi al tiuj lingvoj rolon de internacia lingvo, kiuj tion blinde faras. Kontraŭe, la uzado de Esperanto protektos la naciajn lingvojn. Al la neesperantistoj mi diras: for la manojn de mia gepatra lingvo! Pripensu la sentemon de tiuj, kiuj konas kaj amas ĝin!

Certe, oni lernu kaj legu naciajn lingvojn, se tion oni volas. Certe, en okazo de bezono en fremda lando, oni utiligu tiujn lingvojn por peti direktojn aŭ por mendi manĝaĵojn, se alia rimedo ne ekzistas. Kial ne?

Sed principe oni insistu pri uzado de la internacia lingvo sur serioza internacia tereno.

William Auld

LA ESPERANTLINGVA REKLAMO

Nia fina celo estas enkonduki la Internacian Lingvon en ĉiujn internaciajn rilatojn. La vojo al tiu celo similas al longa rivero, kies akvoj vigle elŝprucas ĉe la fonto, venkas diversajn okstaklojn per transversiĝo aŭ preterpaso, ŝveliĝas per novaj alfluoj, stagnas en lagoj kaj marĉoj, impete ĵetiĝas antaŭen ĉe akvoŝaloj kaj kaskadoj, daŭre grandiĝas kaj fine, antaŭ ol atingi la maron, disiĝas en multbranĉa delto.

La tuta senco de la organizita Esperanto-Movado estas konscie kaj laŭplane faciligi la venkon super la obstakloj, forigi la kaŭzojn de marĉa stagno, ebligi freŝajn alfluojn, reguligi la akvoŝalojn kaj per ĉio ĉi rapidigi la fluon.

Fakte, ĉiam pli kaj pli bone estas komprenata tiu esenca karaktero de organizita laboro. Relative tre rapide sistemiĝis kaj plue sistemiĝas unu branĉo de aktiveco post la alia. Kaj la sukcesoj ne povis ne sekvi.

Kiel ĉiam, unu pozitiva rezulto elvokas la alian, same kiel malsukceso kaŭzas plian regreson. Videbla sekvo de la konsiderinda fortikiĝo de la Internacia Lingvo en la lastaj jaroj estis interalie la ĉiam pli ampleksa reklamado de diversaj entreprenoj en Esperanto. Ne temas nur pri fakte granda nombro da turismaj prospektoj, sed ankaŭ pri vera komerca pagita reklamo. Sufiĉas foliumi la Jarlibron de UEA, aŭ la Kongresan Libron por konstati kiel rapide disvastiĝas la Esperantlingva reklamo. Nun venis la informo, ke eĉ la grandega entrepreno Philips, kiu dum longa tempo havis tutpaĝan reklamon en La Praktiko, produktas filmon kun Esperanta teksto. Alia gravega entrepreno, Gevaert en Belgujo, presigas en la Internacia Lingvo reklamojn por siaj bonegaj filmoj „Gevapan” kaj „Gevachrome”. Ankaŭ tiu entrepreno nun planas publikigon de sonfilmo kun Esperanta teksto.

Estas tute certe, ke, se iu entrepreno decidiĝas reklami per la

Internacia Lingvo, ĝi celas komercan efikon. La fakto, ke jam tiom da firmoj decidigis tion fari, montras ilian pravan atendon de bonaj rezultoj. Kaj tio per si mem estas unu el la gravaj atestiloj pri la praktika valoro de la Internacia Lingvo ankaŭ por la komercaj celoj ĝenerale kaj speciale por komerca reklamado. Siavice, efika komerca reklamo per Esperanto firmigas la poziciojn de la Internacia Lingvo en la komercaj medioj. Fine, belaspekta komerca reklamilo de grava entrepreno multe helpas al plua disvastiĝo de la lingvo.

Pro ĉiuj ĉi kaŭzoj la Esperantlingva reklamo meritas la plej seriozan atenton. La minimumo, kiun devus fari absolute ĉiu esperantisto, estas aĉeti la produktojn, reklamitajn en la Internacia Lingvo. Ne temas, kompreneble, pri aĉetado de produktoj, kiujn oni ne bezonas. Temas pri tio, ke, se oni deziras havigi al si iun objekton, oni prefere aĉetu tiun, kiu estis reklamata en Esperanto.

I. L.

Pri la Leĝo Grammont

Oni povis legi en la gazetoj, ke la Franca Nacia Asembleo antaŭnelonge voĉdone akceptis sendiskute leĝproponon, kiu modifas la leĝon Grammont de 1850, pri Protektado de la Bestoj. Sed tio, kion oni ĝenerale ne scias, estas la aktiva rolo de Esperanto en la preparo de tiu leĝpropono. Efektive, juĝisto en Nîmes estis komisiita por fari tiurilate preparan laboron. Li sin turnis al diversaj fontoj, sed spertis plej grandajn malfacilaĵojn por kolekti la necesajn informojn rilate al la leĝaro pri la bestoj en diversaj landoj.

La cirkonstancoj kontaktigis lin kun esperantistoj, unuflanke s-ro Lentaigne, aliflanke f-ino Minault. Tiuj du geesperantistoj diris al li, ke, verŝajne, ili povos ricevi la necesajn elementojn.

F-ino Minault sin turnis al la esperantistaj juristoj, kies nomoj sin trovis sur la jarlibro de U.E.A.

Taŭgaj respondoj venis, interalie el Britujo, Brazilo, Danlando, Germanujo, Portugala Gvineo, Hispanujo, Svedlando, ktp.

Tiuj informoj konsistigis subtenon de la preparitaj argumentoj, kaj dokumentaro povis esti transdonita al s-ro Grousseau, deputito en Parizo, kaj prezidanto de la Komisiono. Dank' al tiuj klopodoj, la voĉdonado kondukis al akcepto de la leĝo.



43-A UNIVERSALA KONGRESO

Mainz — 2-9 aŭgusto 1958 —
Germanujo

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 5

Februaro 1958

Novaj kotizoj:

Post la 31-a de marto ekvalidos jenaj kotizoj: kongresano: 36 markoj; edzino: 18 markoj; junul(in)o: 12 markoj (ne pli ol 20 jaraj aŭ studentoj).

Individuaj Membroj de UEA rajtas rabaton de 5 markoj; edzino de Individua Membro de 2,5.

Fervoja rabato:

La Germanaj Federaciaj Fervojoj donas rabaton de 33,33 % al ĉiu eksterlanda grupo de 10 ĝis 24 personoj; grupoj de pli ol 25 personoj ĝuas rabaton de 50 %. La rabato validas de la germana landlimo ĝis Mainz kaj revene.

Inaŭgurejo:

La nuna konstruata Sporta Palaco de la Universitato, la plej granda kaj moderna konstruaĵo de Mainz, estos la Inaŭgurejo de la 43-a Universala Kongreso de Esperanto.

Diservoj:

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kaj Kristana Esperantista Ligo Internacia okazigos dum la Kongreso la koncernajn diservojn.

Fakkunvenoj:

Anoncas fakkunvenojn:

- Akademio de Esperanto, Wassenaarseweg 11c, Den Haag.
- La Esperanto-Spiritista Societo, 38 Fillebrook Road, London E.11 pri: „Eksperimentoj en psika esploro”.
- Internacio de Militrezistantoj, S-ro G. Tucker, Birchcroft, Pilgrims' Way, Harbledown, Canterbury, Britujo.
- Kristana Esperantista Ligo Internacia, D. de Boer, Druivenstraat 32, Den Haag, pri: „Nacia kaj internacia politiko en la lumo de la Evangelio”.

Bankedo:

Por festi la oran Jubileon de UEA okazos dum la Kongreso komuna bankedo. Kotizo: 10 germ. markoj.

Oratora konkurso:

Por gejunuloj ĝis 25 jaroj okazos Oratora Konkurso pri „Juna kaj pliaĝa generacioj”. La premioj disponigitaj de L.K. kaj de U.E.A. konsistas el:

1. stipendio de 70 markoj por partopreni en internacia esperantista aranĝo.
2. Esperanto-libroj ĝis 50 markoj.
3. Esperanto-libroj ĝis 30 markoj.

La juĝkomisiono konsistas el: S-ro H. Bourdelon, veterano, S-ro W. Auld, verkisto, S-ro G. Becker, prezidanto de T.E.J.O. La regularo de la konkurso estas publikigita en la Dua Oficiala Bulteno.

Libera komedio:

La Internacia Arta Teatro, sub la reĝisorado de S-ro Srdjan Flego, interkonsente kun L.K.K. prezentos en Mainz, krom „Fantomoj” de Ibsen, ankaŭ alian teatran ludon, sub la titolo „Nova Commedia dell' Arte”. La teatraĵo, kiu okazos sabaton 9 aŭgusto post la fermo de la Kongresejo, estas rezervita al la kongresanoj, kiuj anticipe abonos ĝin ĉe la Kongreso. Enirkosto: 5 germ. markoj.

Kongresaj sekcioj:

La Estraro de U.E.A. decidis, ke la Kongreso laboru en du sekcioj. La unua pritraktos: „Reciproka aprezado de okcidenta kaj orienta kulturaj valoroj. La rolo de la Internacia Lingvo” (Prezidanto: Prof. Yagi, Japanujo; Ĉefraportanto: Prof. Lapenna, Britujo). La Dua pritraktos: „La lokaj societoj, kerno de nia Movado” (Prezidanto: D-ro Herrmann, Germanujo; Raportanto: S-ro Strönne, Svedujo).


Statistiko (ĝis fino de januaro):

Aŭstrujo 23, Belgujo 19, Brazilo 3, Britujo 87, Bulgarujo 4, Danlando 32, Etiopio 1, Finnlando 5, Francujo 193, Germanujo 340, Grekujo 1, Hispanujo 6, Islando 2, Israelo 1, Italujo 44, Japanujo 2, Jugoslavio 29, Maroko 3, Meksiko 1, Monako 3, Nederlando 53, Norvegujo 9, Novzelando 1, Pollando 7, Portugalujo 2, Svedujo 74, Svisujo 25, Urugvajo 1, Usono 5. Entute 976 el 29 landoj. (Pasintjare: 645 el 27 landoj).

G. C. FIGHIERA

Konstanta Kongresa Sekretario

Celstacio



Czeslaw Ostankowicz estas konata vrocłava literatoro, redaktoro de la revuo „Odra”, precipe ŝatata kiel la aŭtoro de multaj raportaĵoj. En la medio de la vrocłavaj beletristoj li estas unu el la simpatiuloj de nia esperanta literaturo.



La stacieto estis malgranda kaj sufokaera. Sur la muroj enuis landkonigaj afiŝoj. La horloĝo malfunkciis. Ĝin strekis kruce gluitaj gazetstrioj. Sur la rando de apertita fenestro dormetis kato de fervojisto. Malantaŭ la kasa ĝiceto homo suferis pro varmego. Li rekonsciiĝis nur je la voĉo de pasaĝero.

— Kien?

— Egale.

— Per la klaso?

— Egale.

— Do eble Gzdzin¹⁾ — demandis la kasisto. Li rigardis ne la pasaĝeron, sed fiksitan per kapnajleto horaron pri trajnoj trakurantaj lian stacieton.

— Povas esti Gzdzin — konsentis la kliento.

— Principe PKP²⁾ devus koni la celstacion de siaj klientoj — grumbletis la fervojisto kaj reiris al la tableto, sur kiu kuŝis biletkajeroj. La kasisto estis malalta sekiĝinta olduleto. Li havis vulpecan vizaĝon de miopulo.

— Do Gzdzin?

— Gzdzin.

— Tie estas nun malsvarme. Vi iras, sinjoro, ekzemple per vojo Z. Arbaro, vojetoj, vi plezure laciĝas per tiu arbaro. Vi povas kuŝiĝi ĉe la vojo, kuŝi kaj pensi nenion.

— Bone — diris la pasaĝero — mi ne volas pensi.

La kasisto komencis plenigi blanketon.

— Kombinata. Estos kombinata. Al Konopiski ekspreso kaj poste normala.

— Ne — oponis la pasaĝero. — Ne povas esti kupeŝanĝo. Mi pensados pri tiu damna kupeŝanĝo kaj mi ja diris, ke mi ne volas pensi. Pri nenio.

— Aha — konsentis la kasisto. Li komencis skrapeti la kalvaĵon. Li studis la horaron, kvazaŭ li ne konus ĝin parkere.

— Ĝis la tria dudek tri mi havas por vi, sinjoro, nenion sen kupeŝanĝo. Je la tria dudek tri iras laborista trajno al Wolów.

— Donu al Wolów — diris la pasaĝero.

— Per la dua klaso?

— Povas esti dua.

— Mi donos al vi la unuan — diris la kasisto — en la dua povas esti plenplene. En Wolów estas hodiaŭ foiro.

— Foiro? — maltrankviliĝis la pasaĝero. Mi ne volas vian Wolów. Mi ne volas homamason. Mi volas kvieton. Sen la homaridado, sen kvereloj, sen voĉoj. Sen virinoj, sen amikoj, sen infanoj. Damno kun tia kiel vi. Kasisto, kaj ne kapablas vendi bileton al homo.

La fervojisto jesis kompreneme. Vere estis al li domaĝe, ke li ne scias helpi la pasaĝeron. Al liaj devoj apartenis ĝusta priservado de la PKP-aj klientoj. Li estis sperta kasisto. Dum sia vivo li certe vendis milionon da diversaj biletoj kaj la pasaĝerojn li havis diversajn. Li ankaŭ pri tiu ne miris. Estis nenio mirinda. Sim-



ple estis malbone al la ulo. Tiaj ne konas siajn celstaciojn. Ili fuĝas nenien.

Li aliris la horaron kaj komencis serĉi. Li faris tion kiel gasto en restoracio. La trajna menuo de la malgranda stacieto estis aĉa. Ne estis tro por elekti: Jezowice, Kakolin, Barcz.

— Mi havas — li diris kun satisfakcio. Mi havas por vi Pustków. La kvina haltejo post Górów. Arbaro. Du kabanoj sume. De la staciestro kaj arbaristo. La arbaristo surda, maljuna. La virino gastama. Kaj lago. La lago ne kulturata, sovaĝa. Depost la tempo kiam oni donis ĝin al kooperativo ne estas fiŝistoj. Akva dezerto, ne lago. Povas esti al Pustków.

— Povas esti — diris la pasaĝero. — Donu al tiu Pustków.

— Per la dua? — demandis la kasisto.

— Per la unua — diris la pasaĝero.

— Ne — meditis la fervojisto — ne valoras. Sep haltejoj, kaj la trajno malplena. Cetere la unua klaso entute ne estas en tiu vagonaro.

— Donu la duan.

La kasisto surnazigis okulvitrojn kaj komencis plenigi la duaklasan bileton al Pustków, kie estas lago, kvieto kaj la gastama virino de la duonsurda arbaristo, kaj kie oni pensas pri nenio. La pasaĝero apogis sin per la kubutoj je la kasa rando kaj rigardis kiel la fervojisto plenigas la bileton.

Ĝuste tiam aliris lin knabino. Ŝi estis juna kaj tre bele.

— Iru hejmen — ŝi diris al la homo, kiu ne konis la celstacion de sia vojaĝo. Panjo ploras.

La kasisto ĉesis plenigi la bileton. Li malfermis la tirkeston, prenis liniilon, almetis ĝin al la biletaj pintoj kaj kruce trastrekiĝis ĝin per dikaj ruĝaj linioj.

tradukis JERZY GRUM

¹⁾ Gzdzin kaj la ceteraj nomoj de la stacietoj estas en la pola ridigaj per si mem, kiel tipe kutimaj al tre foraj, malgrandaj duonurbetoj, duonvilaĝoj.

²⁾ PKP = mallongigo de Polskie Koleje Państwowe (Polaj Ŝtataj Fervojoj).

Nepalaj Bronzoj



La statuo de Bhupatindra Mall, reĝo de Bhatgaon el la komenco de la 18-a jarcento.

La unua impresio de vizitanto al Nepalo, aŭ pli precize la Valo de Katmandu, estas ke ĝi konsistas el nuraj ridetantaj viroj, virinoj kaj infanoj. Nur poste, kiam oni pli bone ĉirkaŭrigardas, oni rimarkas, ke la stratoj kaj la domoj, la temploj kaj ĉio ĉirkaŭe, je pluraj mejloj, estas grandega malfermita muzeo, en kiu la artverkoj svarmas je ĉiu paŝo.

Norde de Nepalo, Ĉinujo plurfoje en la historio ŝanĝis sian mastron, la Tataroj norde kaj la Moguloj sude, kvaŝaŭ potenca nebridebla hordaro inundis Azion kaj katenis ĝin dum pluraj jarcentoj. Sed Nepalo dum la tuta tempo restis netuŝita, kiel unu el la malmultaj liberaj insuloj sur la Kontinento. En la plej nova epoko Ĉinujo stabiligis sian regadon super Tibeto, sur la limo mem de Nepalo, kaj la Britoj ekregis Hindujon, kiu fine akiris sian sendependecon. Ĝi englutis centojn da reĝlandoj kaj princlandoj, sed respektis la etan Nepalon sur sia norda limo.

Tiu relativa sendependeco kaj relativa paco kiun la Valo de Katmandu — la ĉefurbo de Nepalo kun sia ĉirkaŭaĵo — ĝuis dum la lastaj du jarmiloj, ebligis al ĝi iun ŝanĝilaecan evoluon de religio, de moroj, de arĥitekturo kaj de diversaj artoj.

La pagodo-stilo, kiun ni konas el Ĉinujo kaj Japanujo, evoluis en eta Nepalo, kaj Nepalanoj pentris plejparton de la flagpentraĵoj konataj kiel Tibetaj „tanka“. Sed eble la plej altan ŝtupon ili atingis en la skulptado. Komence ili skulptis en ligno kaj ŝtono. Poste, por doni daŭrecon kaj brilon al la verko la artistoj komencis kovri ilin per maldika tavolo de bronzo. Poste la lignogravurado restis kiel arto aplikita al la arĥitekturo, kaj en ĝi ili atingis nivelon eble nenie en la mondo superitan. La ŝtono daŭre restis ilo por reprezentado de mitologiaj figuroj, sed ĉiam ĝi restis peza kaj groteska. En la bronzo, kontraŭe, ili trovis fine la materialon plej obeeman por la esprimado de siaj ideoj.

La arto en Nepalo, kiel en aliaj feŭdalaj landoj, estis je la servo de la religio — hinduismo kaj budhismo — kaj de la reĝoj. Kaj la du grandaj Aziaj religioj, kun sia superabundo de mitologiaj rakontoj kaj de fantazie multnombra simbolaro donis al la artisto neelĉerpeblan fonton de inspiro. Observante la bronzverkojn de la Valo de Katmandu, du ĉefaj faktoj evidentiĝas. Unue, ke la artisto majstre estris la metion de fandado kaj forĝado de la metalo, por muldi el ĝi jen potencon mason jen delikatan



La supra parto de la „Ora Pordego“, enirejo al la reĝa palaco en Bhatgaon (Nepalo), konsiderata de kelkaj kritikistoj unu el la plej altvaloraj bronzartaĵoj en Azio.



„Harita Tara“ (Verda Stelo) en Svajambunat ĉe Katmandu.



Mitologia leono-gardisto antaŭ templo en Katmandu.

filigranon, laŭ sia deziro, same kiel la perfektajn proporciojn de la kunfandotaj metaloj, por ricevi la ĝustan elastecon, rezistemon al la tempo kaj brilan aspekton. La dua fakto estas, ke la majstro mem laboris kvazaŭ pastro de sia religia fervoro, nesebarebla de la strikte difinita mondkoncepto de dioj kaj demonoj sub kies influo li staris, kvazaŭ en duon-konscia transo. En iu ajn verko, ĉu temas pri rituala lampeto aŭ de la grandioza „Ora Pordego” de la reĝa palaco en la urbo Bhatgaon, ĉiu homa aŭ besta figuro reprezentas tutan legendon mitologian, ĉiu folio aŭ linio, havas sian ekzaktan simblan signifon.

Kvankam realistaj en la reprezentado, ili ne povis eviti stiligon de la figuroj, en kiun ofte miksiĝis simbola senco. La reĝo Bupatindra Malla, kiu regis komence de la 18-a jarcento, eble ne aspektis ekzakte kiel lia bronza statuo sidanta sur la supro de ŝtonkolono sur la ĉefplaco de Bhatgaon. Sed kiom da sereno en lia preĝanta pozo, kiom da majesto en la simpleco de la homo! Sendube ne multaj reĝoj en la mondo estas eternigitaj per pli digna monumento ol tiu ĉi Himalaja princo.

La plejparto de bronzaĵoj verkoj de Nepalo devenas el la jarcentoj 15-a ĝis 18-a, la ora epoko de la Nepala kulturo. Tamen, ni scias, ke similaj figuroj estis farataj jam kelkajn jarcentojn pli frue, kaj ankaŭ nuntempe oni faradas ilin. Ili neniel apartenas al arĥeologio. Eĉ ne al historio. La jarmila Viŝnu kiel la hieraŭ farita Budho egale estas adorataj en ĉiuj temploj kaj stratanguloj. La arto de Nepalo estas sentempa.

T. Sekelj

Sangrilaeca: „Sangri-la” estis la nomo de fantazia himalaja valo, kie kelkaj izolitaj homoj vivis ĝis granda aĝo kaj fondis perfektecan komunumon. Laŭ la romano „La Perdita Horizonte” de James Hilton.)

● **Translokiĝo de Eldona Societo Esperanto.** Eldona Societo Esperanto, Svedujo, kiu ĝis nun havis sian oficejon en Sveavägen 98, Stockholmo, laŭ adreso „fack 19071, Stockholm 19”, translokiĝis al Malmö, kie ĝia oficejo kaj vendejo troviĝas en Möllevångsgatan 20b, laŭ adreso: Box 7043, Malmö 7, Svedujo. Telefono 220 29.

● **I.R.A.M. (Instituto de Studoj kaj Agado sur la Mizaro en la Mondo)** preparas por 1958 tutmondan kampanjon de opinio kontraŭ malsato. Ni invitas niajn legantojn, kiuj havas amikojn aŭ rilatojn en Azio, Afriko, Sudameriko kaj Oceanio, kiuj povas kunlabori por la preparado de tiu kampanjo, konigi al la sekretario de I.R.A.M., 32 rue des Bourdonnais, Paris 1, Francujo, la nomojn kaj adresojn de tiuj personoj.

● **La Jubilea Brita Kongreso okazos en Edinburgĥ,** la ĉefurbo de Skotlando, je pasko, de la 4a ĝis la 7a de aprilo. Interalie en alloga programo estas aranĝitaj du interesaj paroladoj: „Iom pri Koloro” de Tom Fraser, kaj „Pri la Angla Antologio” de Reto Rossetti, unu el la kompilintoj de tiu libro ĵus eldonita de U.E.A.

● **Juna esperantistino el Norvegujo** lastatempe pasigis semajnon en Germana Demokrata Respubliko, kie, interalie, ŝi montris en Pirna la belegan koloran parolfilmon „Bonvenon al Oslo”, afable disponigitan de Norvega Esperanto-Societo, kaj renkontis la estron de la distrikta packonsilantaro de Dresden, kiu interesiĝas pri la esperanta laboro. La esperantistoj en Orienta Germanujo tre volonte bonvenigos aliajn amikojn el „okcidento”!

● **En la hungarlingva regiono de Rumanujo** Esperanto multe vigliĝis. Malfirmiĝis kursoj por studentoj, fervojistoj kaj ĝenerala publiko, gvidataj de prof. D-ro Beier Sándor (Cluj, Salcim 12, Rumanujo), kies lernantoj deziras korespondi kun la tuta mondo. Oni petas alsendon de legaĵo. En la hungarlingva revuo „Korunk”, en gazeto „Utunk” kaj ĵurnalo „Igazság” aperis la unuaj artikoloj pri Esperanto en la tuta respubliko. Aperis interalie hungarlingva traduko de artikolo de prof. D-ro Ivo Lapenna.

● **45-tagan prelegvojaĝon tra Polujo** kaj aliaj landoj faris Simeon Hesapčiev, Membro de la Bulgara Esperanto-Instituto. Tiun vojaĝon vastege raportis la gazetaro. Post prelegoj pri Bulgarujo en Novi Sad (Jugoslavio) kaj Martin (Ĉeĥoslovakio), li eniris Pollandon je la 2a de oktobro 1957 kaj vizitis: Cieszyn, Gdansk, Sopot, Gdynia, Szczecin, Warszawa, Poznań, Wrocław, Opole, Łódź, Bochnia, Nowy Sącz (Sonĉ), Krakow, Wieliczka, denove Cieszyn, Revenante, li deiris en Ostrava, Zilina, Bratislava, Budapeŝto, Subotica kaj denove en Novi

Sad. El liaj spertoj: En Łódź li rigardis la unuan polan parolfilmon en Esperanto, „Mazuraj lagoj”. Li renkontis la 85-jaran faman esperantiston D-ro Kabe; ĉeestis fandan kunvenon de klubo „Verda Stelo” ĉe la redakcio de „Express ilustrowany” (ĉirkaŭ 1000 legantoj de tiu ĵurnalo komencis lerni Esperanton); en Novi Sad li ĉeestis kunsidon de Vojvodina Esperanto-Ligo — la Komitato por lernejoj aferoj en Vojvodina konsentas enkonduki Esperanton en lernejojn, kie oni povas trovi bone preparitajn instruistojn: tion la Komitato sciigis per letero de la 28a de oktobro 1957.


● **Esperanto en internacia komerco.** Krom la naciaj lingvoj, ĉiam pli kaj pli la Internacia Lingvo estas uzata en internacia komerco. Multaj firmaoj korespondas kun siaj eksterlandaj klientoj kaj eldonas prospektojn kaj katalogojn en la lingvo Esperanto. Por kolekti la adresojn de firmaoj, kompanioj, fremdtrafikaj entreprenoj ktp., mi petas ĉiujn, kiuj jam uzas aŭ intencas uzi Esperanton negoce, sciigi tion al mia adreso. Por transsendo de firmaaj E.-presaĵoj mi estus tre dankema. La rezulton de la respondoj mi komunikos al ĉiuj skribontoj. Adreso: Franz Frank, Wasseraalfingen, Germanujo.

● **KUE-Kongreso kaj feriosemajno okazos en Vien** de la 25a ĝis la 31a de julio 1958. Adreso por la kongreso: Walter Mudrak, Wien III, Beatrixgasse 19/9, Aŭstrujo. Adreso por la feriosemajno: Int. Esperanto-Muzeo, Wien I, Hofburg, Aŭstrujo.

● **Diversaj eldonaĵoj.** Katolika E.-centro en Germanujo eldonis flugfolion „**Esperanto und der Katholik**” en 5.000 ekz. Ĝin verkis Ludwig Thalmaier. Bulgara Esperantista Kooperativo eldonis bildstrion de 8 diversaj poŝtkartformataj fotoj el la vivo de sofiaj esperantistoj. Prezo: 4.80 levoj. Aperis bele ilustrita turisma libro pri **Urbo Niterói** (Brazilo), 40 p., formato 21 x 20.

● **Artikoloj en Esperanto** aperas ĉiusemajne en tri nordfrancaj gazetoj: „Nord Eclair”, „Nord Matin”, kaj „La Voix du Nord”. Respondeas pri tio la FD en Croix, Norda Francujo.

● **Multjara delegitino de UEA festas 70-jaran jubileon.** Unu el la plej multjaraj delegitoj de UEA en Jugoslavio, s-ino Priska Haas el Maribor, Maistrova 10, festas sian 70-jaran jubileon. Ŝi delegitiĝis en la jaro 1925. Dum longaj 33 jaroj ŝi modele plenumadis la delegitan funkcion, helpinte ĉiun esperantiston unuopulon aŭ grupon, venintan en sian urbon. Nun, resaniĝinta post longa malsano, s-ino Haas tuj aktiviĝis sur agadkampo plej necesa kaj nobla: perfektigi junulojn en la lingvoscio. Ŝia agado rezultis fondiĝon de la junulara sekcio en la esperanta societo de ŝia urbo. Al la meritplena jubileulino nian koran gratulon kaj dankon!



S-ro Blagoje BOGAVAC (maldekstre), Ĝenerala Direktoro de la Jugoslavaj Fervojoj, kaj S-ro Marcel MOLLION, Ĝenerala Prezidanto de la Internacia Federacio de la Fervojistaj Asocioj Artaj kaj Intelektaj (F.I.S.A.I.C.), honoris per sia ĉeesto la jaran kunvenon de la francaj fervojistoj esperantistaj en Parizo (dec. 1957).

En majo 1957, S-ro Blagoje Bogavac salutis en Esperanto la 9-an I.F.E.F.-Kongreson en Rijeka (Jugoslavujo). Per Esperanto, S-ro Mollion havas daŭrajn kontaktojn kun la alilandaj sekcioj de „sia” federacio. Kvankam ne esperantisto, li estas vigla defendanto de nia lingvo, kies helpon li ofte uzas.



La mondfama turka poeto Nazim Hikmet en ŝtata eldonejo Narodna Prosveta en Sofia (Bulgarujo) legas p. 131 de la lernolibro de Esperanto de Hesapĉiev kaj Sarafov — fragmenton de liaj verkoj sub titolo „Ĉiu lingvo estas belega”:

Dum 1952 jaro en Berlino okazis kongreso de la germanaj verkistoj. La tagon, kiam oni fermis la kongreson, oni aranĝis vespermanĝon por la delegitoj kaj la eksterlandaj gastoj. Ne pasis eĉ duonhoro kaj ĉiuj tabloj troviĝis apud la tablo de la delegacio de la sovetaj verkistoj kaj tie ĉi komenciĝis vigla interparolo en tridek lingvoj. Iu proponis, ke ĉiu poeto tralegu po unu versaĵo en sia patra lingvo. Kiam ĉiuj versaĵoj estis tralegitaj, mi ankoraŭfoje konvinkiĝis, ke ĉiu lingvo estas belega.

Ĉe nia tablo sidis poetoj, kiuj diferencis unu de alia laŭ siaj konvinkoj, sed estis unuigitaj de la deziro honeste servi al sia popolo, de la deziro prikanti ne la morton, sed la vivon.

De maldekstre dekstren: Nazim Hikmet, la direktoro de la eldonejo Kaludiev, vicĉefredaktoro de la turka fako Demirov, redakciestro s-ano Nabi Ibrahimov (de la turka fako), s-ano Hesapĉiev, kiu nun gvidas kurson de Esperanto en la eldonejo.



Fotografajo de la venkinta skipo je la 1957a konkurso: geknaboj el Aylesford Secondary Lernejo, Kent, Britujo, kun sia instruisto, S-ro E. W. Cook (vidu nian februaran numeron, p. 32).



Marjorie Boulton, nia eminenta verkistino, estas unu el la plej laboremaj esperantistoj: krom tio, ŝi estas vicestrino de junulina kolegio. Malgraŭ sia okupateco, ŝi trovis tempon kaj energion por varbi grandan nombron da Apogantoj de UEA — fakte, ŝi ĝis nun tenas la rekordon! Kiu volas venki ŝin en tiu gravega konkurso? Ĉiu esperantisto partoprenu en tiu laboro, havigante al UEA la municion por sia paca laboro!

Radio - Babiloj

(13)

La Esperantistoj havas la dissendojn, kiujn ili meritas

Hilversumo-VARA

Antaŭ la milito la radiodisaŭdiga asocio VARA (= unuiĝo de laboristaj radio-amatoroj) aranĝis bonegan Esperanto-radiokurson gviditan de Jac. Lem poste aperintan en la formo de lernolibro. Post la milito tiu radio-unuiĝo ne redisaŭdigis Esperantokurson, sed uzis Esperanton nur por la dissendo de informoj destinitaj por alilandaj geaŭskultantoj, komence ĉiumerkrede nur dum 5 minutoj, sed la lastan jaron dum 10 minutoj de 23.50—24.00 (M.E.T.). La malfrua horo estas por multaj gesamideanoj tre maloportuna, sed la duobligo de la tempo estas tre kontentiga kresko kaj certe favora sekvo de multaj dankleteroj ricevataj de eksterlandaj geaŭskultantoj. Tia dankesprimado estas tre grava.

Tre verŝajne alia sekvo de tiuj eksterlandaj eĥoj estis la sabatposttagmeza, do tre favorhara dissendo de nederlandlingva propaganda prelego de A. Vollegraaf pri „Internacia kongreso sen tradukistoj” kun komunikoj en Esperanto pri

la tiam okazonta 30-a S.A.T.-kongreso en Roterdamo. Tiu dissendo okazis 27/VII/1957 kaj sekvis 10/VIII/1957 ne noktmeze, sed ankaŭ posttagmeze dissendo de aktualaĵoj de la pasinta semajno, inter kiuj estis aŭdeblaj impresoj pri la ĵus okazinta S.A.T.-kongreso kaj parto de la kongresa salutparolado de Lia Ekscelenco D-ro W. Drees, ĉef-ministro de Nederlando kaj mem Esperantisto!

Kiuj aŭdis tiujn dissendojn, ne forgesu sendi dankkarton aŭ leteron al VARA, poŝtkesto 175, Hilversum (Nederlando) aŭ eĉ rekte al Lia Ekscelenco D-ro W. Drees, ĉefministro, Den Haag (Nederlando), kiu kompreneble ne havas tempon respondi ĉiujn poŝtaĵojn, sed certe ĝojos pro amasa skriba aplaŭdo.

Lavango el dankesprimoj sendube akcelos la enkondukon de Esperanto kiel fako en la elementaj lernejoj en Nederlando kaj novan dissendon de Esperanto-kurso per radio.

Esperanto-radio-kursoj

Pluraj radio-stacioj diverslandaj dissendas komencan Esperanto-kurson. Tia kurso estas multefika, ĉar ĝi atingas gelnemulojn en la plej izolitaj lokoj, kie estus malfacile aŭ tute ne-eble aranĝi parolan kurson, kaj ofte en cirkonstancoj, kiuj kontraŭvole donas abundon da libera tempo. Ni pensas pri blinduloj, kripluloj, malsanuloj en hejmaj aŭ resanigejaj ĉambroj. Ankaŭ mi mem lernis la elementan scion pri Esperanto dum longdaŭra kuŝado en la lito per radio-kurso kaj mi ankoraŭ havas dankajn sentojn al s-ro Heilker, la gvidinto de tiu kurso, pro liaj instruado kaj saĝa instigado, kiuj fideligis min por ĉiam.

Poste mi vidis aliajn bonajn sekvojn kaj grandajn eblojn de radio-kursoj. Pri tio en sekvonta radio-babilo. Sed nun jam mi forte instigas aranĝi radio-kurson en ĉiu lando!

Radio Zagreb

Jam pli ofte mi skribis en ĉi tiu rubriko pri Radio Zagreb. Mi devas konfesi, ke mi pro la malfrua horo de la dissendo, ne regule aŭskultis la lastan tempon, kvankam la interesaj programoj ĉiam tentis min. Refoje cedante al tiu tento, mi estis sufiĉe persista kaj sinofera por resti maldormanta ĝis kvarono antaŭ noktmezo (M.E.T.), sed ne sukcesis aŭdi la deziratan stacion. Poste montriĝis al mi, ke la dissendo de Radio Zagreb okazas nun unu kvaronhoron pli malfrue: de 23.05—23.20 G.M.T. jaŭde; 00.05—00.20 M.E.T. jam vendrede!

La aŭskultado al ĉi tiu stacio do restas nokta aventuro. La plimalfruiĝo de la sendo-tempo havas ne multe pli grandan malavantaĝon sed la grandan avantaĝon, ke pluraj stacioj je tiu horo ne plu dissendas kaj do ankaŭ ne plu ĝenas. La geaŭskultantoj do pli trankvile kaj malpli ĝenate povas ĝui la Esperantoprogramon de ĉi tiu stacio. Vi nepre provu, ĉu ankaŭ ĉe vi la ricevo estas pli bona! Se vi preferas ne resti maldormanta ĝis tiu malfrua horo, vi ja povas utiligi vekhorloĝon je noktmezo! La tre varia programo kontentigos vin!

En januaro 1958-a la unua programo estis humura radio-dialogeto de Petar Giunio „Malbone edukita papago” ludita de tri samideanoj, inter kiuj la aŭtoro, kiuj montris sin lertaj aktoroj. La dua programo temis pri jugoslava folkloro riĉo en vorto kaj muziko. La tria traktis pri Slovenujo, unu el la plej evoluintaj jugoslavaj respublikoj: multaj interesaj informoj estis spicitaj per tipe slovena popola muziko. La kvara diskonigis ĝian modernan literaturon kaj la lasta donis novaĵojn el Jugoslavujo kaj respondojn al geaŭskultintoj skribintaj al la stacio. Do estis granda diverseco en la temoj.

La Esperanto-fako de Radio Zagreb havas novan redakcion

Ĉefredaktoro nun estas la malnova Esperantisto Marko Demetroviĉ. Gehelpredaktoroj kaj geparolantoj estas s-ino Emilija Lapenna, la ĉefdelegitino de U.E.A., kaj Joso Šlat, sekretario de Kroata Esperanto-Ligo. Kiel teĥnikisto kunlaboras samideano Vlado Jurkoviĉ.

S. S. de Jong

ESPERANTO-MOVADO EN LITOVA SSR.

La respublika, unua post la milito, kunveno de esperantistoj en Litova SSR.

La 28.4.57 en Kaŭnas okazis la unua post la milito respublika kunveno de esperantistoj en Litova SSR. Ĝin partoprenis multaj Esp.-pioniroj kaj junaj esperantistoj-delegitoj de Esp.-rondoj el ĉiuj respublikaj altlernejoj k.a.

La unuan salutan parolon diris unu el la Esp.-pioniroj, V. Ruokis, 71-jara profesoro de Kaŭnasa terkultura akademio. „D-ro Zamenhof ligis la ideon de internacia lingvo kun la ideo de la paco,” diris s-ano Ruokis. „Tial ni reorganiziĝu kaj, uzante Esp-on por plivastigi internacian kunlaboradon kaj amikecon, ankoraŭ pli forte batalu por la paco, por ke la homaro povu trankvile vivi kaj labori.”

En la kunveno prelegis: 1. s-ano Edv. Medonis, pri la „Ideo de internacia lingvo ĝis Esperanto”, 2. studentino A. Prapuolenyte, pri „D-ro L. L. Zamenhof, la aŭtoro de Esp.”, 3. stud. Galkus, pri „Esp. nun”.

La reprezentantoj de Esp.-rondoj en la altlernejoj parolis pri la agado de siaj rondoj. S-ano I. Cieška informis, ke la ŝtata eldonejo baldaŭ eldonos Esp.-lernolibron per litovoj.

En la kunveno cetere parolis aliaj Esp.-pioniroj: S. Tjunaitis (kies Esp.-lernolibro aperis jam en la jaro 1912), J. Lazaŭskas (ankaŭ aŭtoro de la jam elĉerpita lernolibro), la pentristo P. Tarabilda (kiu nun jam finas pentri la portreton de L. L. Zamenhof) k.a.

La kunveno elektis la komitaton por reorganizi la asocion de esper-istoj en Lit. SSR. Estis elektitaj 20 gesamideanoj: prof. V. Ruokis, E. Medonis, T. Tjunaitis, L. Noreika, A. Latonas, B. Kazokiene k.c.

Esperantistoj de la ĉefurbo Vilnius organiziĝis en la Esp.-rondo ĉe la klubo de Litova respublika soveto de sindikatoj.

Tiu ĉi rondo somere eldonis stencilitan „Litovan-Esp. vortareton”. En decembro aperos nova eldono de tiu ĉi vortareto (2.500 vortoj), kiun trarigardis kaj korektis s-ano Edv. Medonis.

Laŭ iniciato kaj gvido de s-ano E. Medonis la plej spertaj malnovaj esper-istoj kolektive preparas „Esp.-Lit.” kaj „Lit.-Esp.” vortarojn.

Esp.lecionojn presigis la revuo „Svyturys” (la torĉo), „Tarybinis studentas” (soveta studento) kaj „Raudonoji veliava” (La ruĝa standardo). Diversaj gazetoj aperigis pri esp. artikolojn kaj informojn. La revuo „Svyturys” ekde novembro aperigas Esp.-informan anguleton en Esp. kaj litova lingvoj.

Litova telegramagentejo (ELTA) la 2.12.57 dissendis al la respublika gazetaro detalan informon pri la agado de Vilnusa Esp.-rondo. La informo aperis en pluraj gazetoj: „Kaŭna Tiesa” k.c.



La partoprenintoj de la unua postmilita respublika kunveno de esperantistoj en Litova SSR.



Parto de la prezidantaro de la kunveno.

La 23-10-57 en la gazeto „Gyvulininkystes specialistas” de Kaŭnasa veterinara altlernejo aperis ampleksa artikolo „Esperanto” de la asistento de tiu lernejo s-ano V. Skimundris.

La organo de la Centra komitato de l' organizo de Litova komunista junularo „Komjaŭnimo Tiesa” en sia n-ro 194 de la 2-10-57 aperigis kontraŭmilitan, porpacan leteron de japana esperantisto A. G., kiun ricevis de li la invalido de la Patria milito filatelisto I. Simkinas.

Eksterlandtelefonadoj sen lingvoscipovo

Sur la terglobo ekzistas tre multaj lingvoj.

Ju pli ni transpaŝas la ŝtatajn limojn, des pli malfacila estas la interkompreniĝo kun eksterlandanoj. Eble per la angla kaj franca lingvoj la konversacio ankoraŭ funkcias, kvankam la lerneja lingvoscipovo malofte permesas fluan babiladon.

Sed venante al Italio, Hispanio al Turkio aŭ al orientaj landoj, la interkompreniĝa ebleco finfine estas elĉerpita.

Kelkaj negocistoj ofte bedaŭris, ke por ili ne estis eble kontrakti eksportkomercon, ĉar nek ili, nek kompaniano komprenis la lingvon de la alia kaj konforma interpretisto ne ĉeestis.

Pli kaj pli ankaŭ malgrandaj firmaoj entreprenas im- kaj eksporton kaj ili ne posedas interpretiston. Ĉefe por tiuj entreprenoj servas la antaŭnelonge starigita „Tel-Interpret”. Unue oni aranĝos kvar centrojn por la telefona trafiko eksterlanden, nome en Düsseldorf por Anglio kaj Nederlando, en Frankfurt por Francio, Hispanio, orientaj landoj, Afriko kaj Ameriko, en München por Italio kaj la Balkanlandoj, en Hamburg por Danlando, Svedio, Norvegio kaj Finnlando. Poste oni ankoraŭ en Berlin aranĝos centron por Sovetio kaj Polujo.

Se oni nun deziras telefoni kun eksterlanda kompaniano, oni unue elektu la kompetentan centron, kiu tuj interpretas la parolatajn vortojn de la alvokanto al la eksterlandano kaj ties respondon reen. „Interpret” interpretas po minuto 40—60 vortojn. La interpretistoj vortvorte tradukas kaj al la partoprenantoj estas donata la imago, ke ili rekte parolas kun iliaj kompanianoj.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1958

Stato je la 31-a de januaro 1958.

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Britujo	6963	4385	62.98
2.	Nederlando	5567	3440	61.78
3.	Brazilo	7011	4280	61.46
4.	Danlando	2743	1525	55.60

5.	Svislando	2185	1160	53.09
6.	Usono	3225	1640	50.85
7.	Belgujo	1907	903	47.35
8.	Francujo	7647	3476	45.46
9.	Hispanujo	2508	1045	41.67
10.	Norvegujo	2144	855	39.88
11.	Finnlando	2765	1090	39.42
12.	Germanujo	6865	2972	34.30
13.	Jugoslavio	3800	1225	32.24
14.	Pollando	6150	1655	26.91
15.	Svedujo	6945	2270	22.69
16.	Italujo	4030	745	18.49

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Izraelo	240	200	83.33
2.	Kanado	440	345	78.41
3.	Aŭstralio	1228	815	66.37
4.	Japanujo	1280	725	56.64
5.	Portugalujo	560	270	48.21
6.	Novzelando	955	380	29.80
7.	Maroko	659	181	27.47
8.	Aŭstrujo	1505	380	25.25
9.	Islando	315	75	23.81
10.	Sudafriko	235	50	21.28
11.	Urugvajo	414	125	20.19
12.	Argentino	1005	30	2.99

C E D

En la februara numero de „Esperanto” ni komunikis la staton de donacoj je la 31-a de decembro 1957. Ĝi estis £ 175.1.7. Post tio, la C.O. informis pri kelkaj pliaj donacoj, alvenintaj en 1957, kiuj ne estis entenitaj en tiu sumo. Ni do komunikas la nomojn de la donacintoj kaj la donacitajn sumojn:

	£	ŝ	p
Stato je la 31-a de decembro 1957, jam anoncita	175.	1.	7
S-ro F. Schneider, Germanujo	—	7.	2
N. N., Aŭstralio	3.	19.	4
N. N.	2.	17.	1
Plie kolektita en Marseille	1.	—.	—
S-ro D. E. Parrish, Usono	1.	15.	8
S-ro J. Th. de Goeij, Nederlando	—.	9.	5
S-ro L. Minnaja, Italujo	—.	18.	9
	£	186.	9. 0

DONACOJ POR CED EN 1958

	£	ŝ	p
Gesinjoroj Laurie, Britujo	1.	10.	—
S-ro Russell Scott, Britujo	—.	10.	—
Societo Esperantista Universitata, Britujo	—.	10.	—
S-ro Marly, Francujo	—.	16.	6
S-ro Pottier, Francujo	—.	8.	3
S-ro Lecocq, Francujo	—.	8.	3
Generalo L. Bastien, Francujo	1.	13.	—
S-ro G. R. Aitchison, Britujo	2.	—.	—
Prof. J. P. Beau, Francujo	—.	8.	3
Stato je la 7-a de februaro 1958	8.	4.	3

Al ĉiuj donacintoj plej koran dankon. Donacojn por CED oni povas sendi al la Centra Oficejo de UEA, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, C. Nederlando; al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, rue de Chabrol, Paris X, Francujo; al ĉefdelegitoj aŭ perantoj de UEA aŭ al CED rekte je la nomo kaj adreso de ĝia direktoro, 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Britujo.

La Nibelungoj

Inter la malnovaj Rejnurboj Worms prave fieras pri sia katedralo, kaj pri la honoro, ke reĝoj germanaj kaj frankaj ofte rezidis malantaŭ ĝiaj muroj. Dum la granda popolmigrado Worms estis metropolo por la regno de la Burgundoj kaj ĝi fariĝis tiel scenejo de la plej bela germana epopeo pri la ideal-heroo Sigfrid.

Kie originas tiu legendo? Ĉu Sigfrid — aŭ Sigurd — estis lumfiguro religia, kiun venkas obskuraj potencoj, ĉu li simple estis blonda sveltkreskinta fabelbravulo, ĉu eble eĉ historia persono? — Ni lasu tiun problemon al scienculoj, por ni la suna Sigfrid estas kaj restas la favorito de pluraj germanaj eposoj. Kie ajn la Rejnanoj kun senbrida batalemo frontas kontraŭ la atakemajn fortulojn el oriento, tie Sigfrid gvidas siajn kunbatalantojn. Multaj malnovaj mitoj lin laŭdas, jen tiu pri kavaliro Ditlajb, serĉanta sian patron Biterolf, jen la kanto pri la rozĝardeno de Worms, por menci nur du el la plej konataj. La mitaro pri la tri burgundaj reĝoj Gunther, Gernot kaj Giselher, kies kerno estas la sorto de la popolfavorito Sigfrid, migradis per bardaj kantoj multfoje variata de la rejnaj kasteloj ĝis la gentoj ĉe la Danubo, perdante pli kaj pli sian spiriton dume.

Dank' al nekonata — kaj supozeble neniam ekkonota — bardo, kiu fine de la dekdua jarcento kunigis la unuopajn mitojn kaj rakontojn al granda epopeo skribe fiksita, la Nibelunga Kanto konserviĝis kiel valora fragmento de ĝermana prapoezio ĝis nuntempo. Komence idilio dolĉa — fine tragedio kruela — ĝi estas potenca kanto pri kulpo kaj puno, emocie tuŝanta ĉiun leganton.

Al la kortego de Gunther, reĝo de Burgund en Worms, venas juna blonda bravulo, nome Sigfrid, allogita per la ĉarmo de

Krimhild, la fratino de la reĝo. Li mem estas reĝido, lia patro Sigmund suverenas en Ksanten ĉe la malsupra Rejno. Reĝo Gunther dungas la sveltan, tenden an fortulon kiel vasalon. Fidela al sia feŭdestro, Sigfrid nevidebla per sorĉa kasko batalvenkas la fieran reĝinon de Islando, Brunhild. Por danki lin, Gunther edzinigas Krimhildon al li, kaj Sigfrid donas al ŝi kiel fianĉdonaĉon la Nibelung-trezoron, kiun li junulo batalprenis de la Nibelung-reĝidoj kaj de la gardisto Alberiĥ.

Ĝojo kaj kontento regas en Worms ĉe la kortego. Ĉu por ĉiuj? Ŝajne jes. Sed ne nur Krimhild, ankaŭ Brunhild — sekrete — tre ŝatas la fortulon Sigfrid. La fianĉfeliĉo de Krimhild nutras la envion en ŝia koro kaj ŝi ĉial mallaŭdas kaj malflatas la rivalinon Krimhild. Pli kaj pli malamiĝas la du virinoj. Iutage tro akra malfavoro el la vortoj de Brunhild igas Krimhildon liberigi sian langon. Dum impeta disputo ŝi humiligas la bofratinon fivorte, malkovrante ke siatempe en la edziĝa lito ne estis Gunther sed Sigfrid, kiu ŝin bridis. Kiel pruviĉon ŝi montras ringon kaj zonrubandon, kiujn Sigfrid forprenis de la forta Brunhild kaj donacis al Krimhild, sia edzino. Memfide kaj ofende ŝi rifuzas al la reĝino la rajton pri antaŭiro ĉe la katedrala pordo.

Singulte Brunhild rakontas al reĝo Gunther pri la ofendo suferita. Li ekkoleras kontraŭ Sigfrid kaj instigas sian servulon Hagen pereigi la malamaton, laŭdire por venĝi la humiligon al la reĝino, pli sincere eble pro la Nibelunga trezoro. Dum ĉasado en Odenwald Hagen inside pikmurdas Sigfridon surgenu trinkantan. Interkonsile oni konspiras diskonigi, ke rabistoj murdis lin dum li sola ĉasadis. La sekvan tagon la reĝo kun sia anaro reiras trans la Rej-

non al Worms. Hagen ordonas kuŝigi la murditan dumnokte antaŭ la dormejon de Krimhild. Fru-matene kiam ŝi volas kun siaj akompaninoj ekiri al la katedralo, por la meso ŝi ekvidas la karan mortinton kaj multvoĉe aŭdiĝas ĝemado. Ploreĝante Krimhild sin ĵetas sur la murditan edzon, vokante: „ve, ve, via ŝildo ne estas disbatita per glavoj, insida murdo vin rabis de mi! Se mi sciis, kiu tion faris, li ne vivus longe plu!”

Sur pompan katafalkon oni metas la reĝan heroon kaj Krimhild ordonas estigi Dian Juĝon. Ĉar estas granda miraklo, ke la vundoj de murdito eksangumas denove, kiam la murdinto proksimiĝas. Ĉiuj princoj kaj nobeloj el Burgund venas kaj procesias preter Sigfrid, super kiu pendas bildo de la Savinto ĉe la kruco. Jen Hagen obskurmiene preterpaŝas kaj freŝa sango ekfluas el la vundoj. En ĉeesto de konsternitaj viroj kaj teruritaj virinoj Krimhild akuzas lin murdinto de sia edzo.

Kaj la kompenso por tiu granda kulpo: la Nibelunga Trezoro, ĉefa kaŭzo de la hontiga fiago, estas ĵetata profunden en la Rejnon por eligi avidon kaj malpacon el la koroj de la bravuloj. Sed tio trankviligas nek la ĉagrenon nek la venĝemon de Krimhild. Vane reĝo Sigmund petas, ke Krimhild post enterigo de Sigfrid venu al lia kastelo en Ksanten. Ŝi restas en Worms, ĉiam proksime al la karega mortinto, dum dektri jaroj. Tiam la afliktita virino transloĝiĝas al la abatejo Lorĥ ĉe la Rejno, kiun fondis ŝia patrino, la dukino Ute. Tien ŝi ankaŭ kunportas la ĉerkon de Sigfrid.

Kiam Etzel, la reĝo de la Hunoj, ŝin svatas, Krimhild donas al li idolano sian manon. Ne la amo, sed ŝia venĝemo decidigas ŝin. Kun li ŝi iras al Hungarujo. Kaj tie prizorgas kruelan pereon por la murdinto de sia edzo, kiun ŝi gastige invitas kun granda eskorto. En la kastelo de Etzel ankaŭ la kunkulpaj reĝoj burgundaj devas penti per sia morto la perfidon al Sigfrid: senkompate la Etzel-

edzino Krimhild igas buĉmortigi sian tutan parencaron. Per la glavo de Sigfrid ŝi mem senkapigas Hagen. Tio kolerigas ankaŭ ŝiajn kunbatalantojn kaj Krimhild mortas sub la glavo de Hildebrand.

Tiel finiĝas la rakonto. La Nibelunga Kanto fariĝis la plej fama el ĉiuj germanlingvaj heromitoj, komparebla inter malnovaj mitoj de aliaj popoloj nur kun la epopeo pri Trojo de Homero. Per ĝiaj versoj la historia fino de la lastaj reĝoj burgundaj el Worms estas poezie glorata por eterno.

(*Esperantigis: G. Ritterspach*)

El „La plej belaj mitoj de l' Rejno”, Hoursch & Bechstedt-Eldonejo, Köln-Ehrenfeld, Germanujo. Havebla en la germana, angla, franca kaj nederlanda lingvoj.

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Oficiala Servo de U.E.A.

Kial Korespondi?

Korespondado estas unu el la plej gravaj avantaĝoj, kiujn Esperanto alportas al siaj uzantoj. Ekster la kelksemajna libertempo ĉiujara, kiam la plej feliĉaj inter ni povas vojaĝi eksterlanden, ĝi ebligas tutjaran uzadon de Esperanto kaj akcelas la pliproksimigon de la koroj kaj de la spiritoj trans la landlimoj, kio estis ja la deziro de la kreinto de nia lingvo.

Dank'al Esperanto, ĉiu unuopulo povas rekte informiĝi pri ĉio, kio okazas en kiu ajn punkto de la mondo kaj tio estas avantaĝo, kiun ĝis nun havis nur grandaj gazetoj aŭ tutmondaj organizaĵoj. Ĉiu el ni devas konscii pri tio kaj persone profiti tiun unikan avantaĝon.

Neniu povas diri, ke korespondado ne interesas lin. Por la junaj kaj novaj esperantistoj, ĝi estu rimedo por pliperfektigi la stilon kaj plifaciligi la personan esprimeblecon, kaj samtempe instigilo por konservi viglan intereson kaj resti entuziasma esperantisto. Tio ĝi estu ankaŭ por pli progresintaj samideanoj (ĉar neniu povas diri: „Nun mi finfinis mian studon de Esperanto!” Ĉiu estas perfektigebla) kaj plie ĉi tiuj nepre devas kuraĝigi la novulojn kaj instigi ilin resti en niaj vicoj, korespondante kun ili kaj tiel donante al ili modelon de matura stilo. Do estas du kialoj: kaj por plibonigi sian Esperanton, kaj por pli bone koni (kaj ami) la mondon, ĉiu esperantisto **devas** korespondi.

Kiel korespondi?

Estas diversaj manieroj organizi sian personan korespondadon. Oni povas

elekti unu aŭ plurajn „leteramikojn”, kun kiuj oni interŝanĝas ĉiuspecajn ideojn kaj pensojn, al kiuj oni konfidas siajn ĝojojn kaj penojn per pli malpli regulaj leteroj. Tiamaniere oni pli kaj pli bone konas unu la alian, la ĉiutagan vivon, la familiajn okazaĵojn, la ĝisfundan personecon, per pli kaj pli forta korligilo, kaj ĉiu letero de tiaj amikoj alportas veran ĝojon. Kaj oni havas la esperon (kelkfoje eĉ la efektivigon) de iama renkontiĝo, kiu estos granda feliĉo.

Alia maniero: oni korespondas dum iom da tempo kun iu en iu preciza lando, interŝanĝante kun li ekz. kvin aŭ dek leterojn kaj informiĝante iom post iom pri la lando de l' korespondanto, pri moroj, kutimoj, ktp., tiom longe, kiom restas intereso por ekkoni aliajn detalojn pri la koncerna lando. Poste, oni alprenas alian korespondanton en alia lando, pri kiu oni deziras ankaŭ informiĝi.

Tiu dua sistemo estas konsilinda por la ĝejnuloj, ĉar ĉi tiuj bezonas ĉiam pli kaj pli bone koni kaj kompreni la

homojn kaj ideojn el aliaj landoj. Tio povas alporti al ili multe da profito (ekzemple en ilia studado) kaj malfermas iliajn spiritojn kaj korojn al tiu universaleca mondkoncepto, sen kiu la morgaŭa mondo estus nur haoso kaj kiu faros el ili verajn mondĉivitanojn. Tiamaniere internacia korespondado povas fariĝi potenca helpilo por la tuthomara edukiĝo, plivastigante la horizonton de ĉiu.

Mi memorigas, ke K.S.M. estas preta helpi vin por trovi taŭgajn korespondantojn. Disponigu vian adreson al ĝi kun detalaj informoj pri vi mem (vidu la decembran numeron de „Esperanto”), ne forgesante liston de almenaŭ kvin nomoj de landoj vin interesantaj kaj indikon de nombro de akceptotaj korespondantoj. Kaj mi transdonos al alilandaj petantoj. Se vi mem deziras personan respondon, bonvolu aldoni tiom da internaciaj respondkuponoj, kiom da petataj adresoj.

Nura adreso de K.S.M.: Daniel Luez, **Laon** (Aisne), Francujo.

Statistiko pri la Membraro de U.E.A. en 1957

Lando	AM	MJ	MA	MS	Pat.	DM	HM	J-MJ	J-MA	Sumo
Acoroj	—	—	3	—	—	—	—	—	—	3
Alĝerio	—	—	2	1	—	1	—	—	—	4
Angolo	—	—	2	—	—	—	—	—	—	2
Antiloj ned.	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Argentino	250	—	40	7	—	8	—	—	—	305
Aŭstralio	103	3	87	16	—	12	—	—	—	221
Aŭstrujo	400	26	85	5	—	2	3	—	1	522
Belgujo	492	25	106	15	—	4	1	—	—	643
Bermudo	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Borneo	—	—	—	—	—	1	—	—	—	1
Brazilo	2441	61	270	91	3	27	1	—	—	2894
Britujo	733	83	441	85	—	70	5	1	11	1429
Bulgarujo	1120	4	253	9	—	1	1	—	—	1388
Cejlono	—	—	—	—	—	1	—	—	—	1
Cipro	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Ĉeĥoslovakujo	—	36	431	4	—	3	6	3	8	491
Ĉilio	—	—	4	—	—	—	—	—	—	4
Ĉinujo	—	—	3	—	—	1	—	—	1	5
Danlando	833	28	147	20	—	1	1	—	—	1030
Egiptujo	—	—	—	—	—	2	—	—	—	2
Etiopio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Finnlando	—	44	233	2	—	1	1	5	17	303
Franca okc.afriko	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Francujo	1487	85	474	58	—	19	8	—	5	2136
Gabono	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Ganao	—	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Germanujo	2000	51	340	63	—	13	2	4	15	2488
Grekujo	—	—	12	—	—	—	1	—	—	13
Gvatemalo	—	—	5	—	—	—	—	—	—	5
Hindujo	—	—	2	—	—	—	—	—	—	2
Hispanujo	328	5	183	21	—	6	—	—	—	543
Hungarujo	300	1	16	—	—	—	3	—	—	320
Indonezio	—	—	3	—	—	—	—	—	—	3
Irano	—	—	1	—	—	2	—	—	—	3
Irlando	—	3	8	—	—	1	—	—	—	12
Islando	—	1	28	2	—	3	—	—	—	34
Italujo	1100	27	233	21	—	5	1	2	9	1398
Izraelo	—	—	24	—	—	2	—	—	—	26
Japanujo	150	18	106	—	—	—	1	—	—	275
Jugoslavio	2000	14	158	12	—	3	—	—	6	2193
Kameruno	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Kanado	—	1	32	7	—	3	—	—	1	44

Ĉu vi konas nian Esperantistan Kulturdomon?



Antaŭ ses jaroj la Francaj Esperantistoj aĉetis, en la bela regiono de la „Loire-aj Kasteloj”, la bienon Grésillon. Tie, meze de bela parko, kun lageto, banejo kaj boskoj por trankvile promeni, la Esperantistoj el la tuta mondo sentas sin hejme.

Tiu eta peco de Tero vere estas Esperantolando.

Oni tre facile povas iri al Grésillon, ĉu per vagonaro, ĉu per aŭtobuso, ĉu per persona veturilo. Se oni uzas la vagonaron (ĉirkaŭ kvarhora vojaĝo el Parizo), oni trovas samideanon ĉe la stacidomo, kun aŭtomobilo; se oni alvenas per veturilo, oni prenas en Baugé la vojon al Le Lude: la kastelo situas dekstre de la vojo, je 1500 m el la urbeto.

La kulturdomo proponas nun al siaj gastoj tre modernan komforton; kaj la vivo tie estas tute libera, kondiĉe tamen, ke oni povu organizi la kolektivajn laborojn kaj distron; ĉar oni ankaŭ sin amuzas en Grésillon; oni eĉ dancas aŭ vidas filmojn.

Por 1958, la Kulturdomo proponas la jenan ĝeneralan programon:

Dum la Paska libertempo, de la 30-a de marto ĝis la 13-a de aprilo:

Esperanto kurso, bindarto, diversaj okupoj.

De la 15-a de junio, ĝis la 14-a de julio: Ripozo, Esperanto kurso por komencantoj, bindarto, diversaj okupoj.

De la 15-a ĝis la 27-a de julio: Internaciaj Ferioj.

De la 17-a de julio ĝis la 10-a de aŭgusto: Lernado de la Franca lingvo pere de Esperanto.

De la 10-a ĝis la 31-a de aŭgusto: Niaj Esperantistaj kulturaj semajnoj.

De la 1-a ĝis la 20-a de septembro: Ripozo kaj diversaj aranĝoj.

Por ĉiuj tiuj restadoj, ni estas pretigintaj la detalajn programojn. Tiun de niaj „Internaciaj Ferioj” ni jam povas prezenti al vi ĉi-sube.

Internaciaj Ferioj

Kun la partopreno de Paul Neergaard, André Albault, R. Watier kaj P. Babin.

Jen la titoloj de la diversaj paroladoj:

Paul Neergaard: La sciencistoj kaj la socio (3 paroladoj); La sciencistoj kaj Esperanto; La progresigo de popularscienca literaturo en Esperanto (2 paroladoj); Sciencaj kaj fakaj terminaroj en Esperanto; La bezono de bibliografioj pri la scienca literaturo en Esperanto; La ebloj por fondiĝo de Internacia Universitato kun Esperanto kiel laborlingvo.

André Albault: Akuŝo sen doloro (du paroladoj); Kion oni sciu pri okulmalsanoj; La mekanismo de Esperanto.

R. Watier: La inventistoj kaj la inventoj (3 paroladoj); Lingvo-pedagogio adaptita al komerca kaj scienca interkomunikado (debato); La lingvoj en scienca dokumentado (debato).

P. Babin: La edukado kaj la disvolviĝo de internacia toleremo (2 paroladoj); La baza edukado de Unesko.

Plie, dum la restado estas antaŭviditaj: Parolado pri la „Loire-aj Kasteloj”.

Tuttaga ekskurso al Tours, Amboise, Chambord, Blois, Azay-le-Rideau (lumigita), Rigné-Ussé kaj Saumur.

Ni ege konsilas skribi sufiĉe frue. Ĉiujn pliajn informojn vi ricevos, skribante al Esperantista Kulturdomo, Kastelo de Grésillon, **Baugé** (Maine et Loire), Francujo.

BONVOLU KOREKTI

En la artikolo de Prof. Lapenna „Omaĝe al la Memoro de D-ro Stanislav Kamaryt”, publikigita en la februara numero de „Esperanto”, ĉe transskribado okazis tajperareto, kiu malfortigas la diron de D-ro Kamaryt. Sur la p. 23, linioj 25—27, estas presita eltiraĵo el la letero de D-ro Kamaryt al Prof. Lapenna de la 27-a de januaro 1952 en jena formo: „Mi legas viajn artikolojn pri la problemoj de la Movado ĉiam kun granda intereso”. Kiel oni vidas el la fotokopio, publikigita sur la p. 24 de la sama numero, la vorto „Movado” devas esti skribita per minusklo kaj anstataŭ „granda intereso” devas esti „aproba intereso”.

Ni afable petas korekti tion.

Kenjo	—	—	1	—	—	1	—	—	—	2
Kolombio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Kongo Belga	—	—	2	1	—	—	—	—	—	3
Kostariko	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Koreo	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Kubo	—	—	4	—	—	1	—	—	—	5
Libano	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Libio	—	1	4	—	—	—	—	—	—	5
Lihtenstejno	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Madagaskaro	—	—	3	—	—	—	—	—	—	3
Malajo	—	—	—	1	1	—	—	—	—	2
Malto	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Maroko	104	11	23	18	—	5	1	—	—	162
Meksikio	—	—	11	—	—	1	—	—	—	12
Monako	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Nederlando	672	59	372	36	—	16	5	—	9	1169
Nigerio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Norvegujo	664	15	109	22	—	7	1	—	1	819
Nov-Gineo	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Nov-Zelando	200	13	50	10	—	9	—	—	—	282
Pollando	2300	—	385	—	—	—	1	—	1	2687
Portoriko	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Portugalujo	—	1	39	11	—	4	2	—	—	57
Rodezio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Rumanujo	—	—	—	—	—	—	1	—	—	1
Sarlando	—	1	18	1	—	1	—	1	5	27
Siera Leono	—	—	—	—	—	1	—	—	—	1
Sovetunio	—	—	28	—	—	—	—	—	—	28
Sudafriko	—	2	18	3	—	3	—	—	—	26
Svedujo	1450	119	384	66	—	23	2	—	2	2046
Svislando	120	66	120	17	1	34	3	—	3	364
Tajlando	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Trinidado	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Turkujo	—	2	29	—	—	—	—	—	—	31
Urugvajo	54	—	20	10	—	1	1	—	1	87
Usono	250	17	206	46	—	18	1	—	7	545
Venezuelo	—	—	9	1	—	—	—	—	—	10
78 landoj	19551	825	5585	683	5	317	53	16	103	27138

Post 1-1-1958 alvenis ankoraŭ pluraj pagoj por 1957. Pro tio la fina cifero de tiu ĉi statistiko estas ankoraŭ pli alta ol anoncita en la februara numero.

NOVA ETAPO DE ĈINA E-MOVADO

1957, la 70-jara datreveno de la publikiĝo de Esp-o, markis novan etapon de ĉina E-movado. Post la revigliĝo de Ĉina Esperanto-Ligo, organiziĝis en diversaj urboj Esperantaj kursoj kaj lernogrupoj. La lernantoj en tiuj kursoj kaj grupoj jam en sia lernado komencis korespondadon kun esperantistoj en aliaj landoj. Kelkaj komencantoj en Bengpu, urbo en Anhui-Provinco, kiuj eklernis nian lingvon en printempo 1957, jam korespondis kun 66 esperantistoj en 12 landoj oktobre en la sama jaro. Unu el ili diris: „Laŭ vortoj de Lenin, scio de unu plia fremda lingvo egalas al unu plia fenestro por la domo. Sed lerninte Esperanton, mi sentas kvazaŭ malfermiĝus fenestroj en ĉiuj flankoj de la domo.” Je la 40-a Datreveno de la Oktobra Revolucio amaso de salutleteroj estis senditaj de ĉinaj esperantistoj tra la tuta lando al Sovetiaj esperantistoj. En Enshi, urbeto de Hubei-Provinco, K-do Jaŭ Pin starigis eĉ regulan rilaton kun K-do A. Erjuhin, redaktoro de „Norda Pravda” kaj „Lesnik Severa” (Nordaj Arbarkulturistoj) en Arhangelsk de Sovetio. Li peris ankaŭ la korespondon inter K-do A. Erjuhin kaj agrikulturaj kooperativoj en Enshi. Tiamaniere la „Norda Pravda” akiris rektajn informojn pri la vivo de ĉinaj kamparanoj kaj sur la loka ĵurnalo en Enshi ankaŭ ofte aperis korespondadoj de K-do Erjuhin, kaj per tio la kamparanoj en Enshi pli bone komprenas la amikecon inter Ĉinio kaj Sovetio.

Instruado de Esperanto en lernejoj ne prosperis en Ĉinio. Antaŭe nur en 1921 ĝi estis instruata en tiama Pekina Universitato, sed post nelonge tiu kurso ĉesis, kaj Esperanto neniam plu sukcesis enpenetri la lernejon. Sed ekde la dua semestro de 1957 Ĉina Popola Universitato, nov-tipa ŝtata universitato, enkondukis Esperanton kiel nedevigan taskon en la ĵurnalisma fakultato. Tio estas rimarkinda eksperimento por pli grandskala enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Estas interese, ke en la komenco multaj el la lernantoj lernis la lingvon skeptike. Ili lernis la lingvon, sed ne elektis ĝin kiel lernejan taskon. Tamen post kelkamonata lernado fine ili faris favoran decidon. Evidente la eksperimento akiris primaran sukceson.

Lasttempe ĉe la 98-a datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, en Pekina Laborista Kultura Palaco malfermiĝis nova kurso por laboristoj kaj sindikataj laborantoj. Tio kreas novan esperon por ĉina Esperanto-movado, ke Esperanto-movado en Ĉinio disvastiĝos ne nur en la kadro de intelektuloj, sed enradikiĝos kaj disfloros ankaŭ en la laboristaro kaj kamparanaro.

Okulfrapa progreso estas la reapero de „El Popola Ĉinio”, la gazeto longe sopirata de esperantistoj eksterlandaj. Dum preskaŭ tri jaroj depost ĝia ĉesiĝo Ĉina Esperanto-Ligo ja ricevis sennombrajn leterojn postulantajn ĝian reaperon. Nun

tiu ĉi espero efektiviĝas, sed por ĝia plua kresko kaj disvolviĝo ĝi bezonas pluan subtenon de ĉiuj esperantistoj. Tiun ĉi gazeton nun eldonas mem Ĉina Esperanto-Ligo, kaj ĝia enhavo pli taŭgas por esperantistoj. Laŭ peto de legantoj ĝi fariĝas gazeto pli kultura. Krom la vivo de ĉina popolo, la novaj aspektoj kulturaj kaj ekonomiaj, ĝi donas al la legantoj ankaŭ sciojn pri ĉina tradicia kulturo, informojn pri naciaj malplimultoj kaj kulturaj interfluoj inter Ĉinio kaj aliaj landoj. E-movado en Ĉinio kaj leteroj de ĉiulandaj esperantistoj aperos ankaŭ en la gazeto. Tiel la gazeto fariĝas ne nur gazeto pri ĉina kulturo sed ankaŭ gazeto de E-movado.

Multaj esperantistoj eksterlandaj vizitis Ĉinion en la unua jaro de la revigliĝo de ĉina E-movado. Pli ol 25 esperantistajn gastojn el 11 landoj akceptis Ĉina Esperanto-Ligo ekde decembro 1956 ĝis decembro 1957. Inter ili troviĝis Sovetiaj specialistoj aŭ teknikistoj, amikaj delegitoj de popolaj organizoj el Azia kaj Eŭropa landoj, la speciala ambasadoro por Oriento de UEA, la „Vaganta Avino”, esperantista turistino el Nov-Zelando kaj preterpasantoj tra Pekino por partopreni la festivalon en Moskvo aŭ por vojaĝi al aliaj landoj. Tio estas maloftaĵo en la historio de ĉina esperantista societa vivo. En la kunvenoj de Pekina Esperanto-Klubo oni ofte havis la feliĉon aŭdi raportojn aŭ paroladon de eksterlandaj esperantistoj.

La festo de la 98-a datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof en 1957 vekis je la publiko en Ĉinio pli grandan atenton pri E-movado. En tiu tago ne nur la Ĉina Esperanto-Ligo aranĝis memorkunvenon en la Pekina Laborista Kultura Palaco, kie malfermiĝis samtempe Esperanta kurso por laboristoj, sed sur la du plej grandaj ĵurnaloj en tuta Ĉinio aperis samtempe ankaŭ artikoloj pri Esperanto kaj D-ro Zamenhof. K-do Chen Yunan en sia artikolo „70 Jaroj de Esperanto” publikigita sur „Popola Ĵurnalo” historie rakontis la problemon de internacia lingvo kaj ĝia solvo per Esperanto kaj la nunan staton de Esperanto-movado. Li konvinke klarigis la fakton, ke Esperanto fariĝis jam lingvo vivanta. Ĉu vi ĝin aprobas aŭ ne, vi ne povas nei, ke E-movado estas grava faktoro de internacia socia vivo. La alia artikolo de Venlo Fon sur Guangminf-Ĵurnalo (La Lumo) siavice rakontis la vivon kaj la ideon de D-ro Zamenhof. Li analizis la kaŭzojn de la sukceso de Esperanto.

Parolado de Sovetia kamarado Prof. N. S. Kokŝarskij en tiu ĉi kunveno vekis grandan intereson de la ĉeestantoj. Tiu ĉi ĉirkaŭ 60-jara maljuna kamarado, kvankam jam preskaŭ tridek jarojn ne praktikis Esperanton, flue kaj klare klarigis en Esperanto la amikecon inter ĉina kaj Sovetia popoloj kaj la rolon de Esperanto en interligiĝo de la popoloj en la mondo.

Tiun ĉi feston de Zamenhof raportis ankaŭ Xinhua Novaĵo-agentejo, la ŝtata informo-servo pri novaĵoj. Tial en la sekvanta tago ĉiuj pli-malpli grandaj ĵurnaloj aperigis informon pri la festo.

En lastaj jaroj la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj aliaj landoj intensiĝas, la kontaktoj inter ĉina popolo kaj la popoloj en aliaj landoj oftigas. Tial la neceso de internacia lingvo pli kaj pli sentiĝas kaj la intereso por lerni Esperanton pli kaj pli grandiĝas. Maigraŭ la malfaciloj: nesufiĉo de spertaj esperantistoj, manko de taŭgaj lernolibroj por ĉinoj, ĉinaj esperantistoj kredas, ke ili venkos, ĉar ĉina E-movado ja ricevas subtenon de la kulturaj rondoj, kaj la malfaciloj estos venkitaj unu post la aliaj. Nun lernolibro de Esperanto taŭga por ĉinoj kaj nova vortareto estas kompilataj, eldono de aliaj Esperantaj libroj pri ĉina literaturo, scioj pri Ĉinio ankaŭ estas planata. Sub la subtenado de tutmondaj esperantistoj E-movado certe prosperos en Ĉinio kaj ĝi ludos pli gravan rolon por akceli la interkomprenon kaj amikecon inter ĉina popolo kaj popoloj en aliaj landoj, kaj por propagandi la ideon de paca kunekzistado de malsamaj socisistemoj, kiu ja estas la plej praktika vojo por garantii la mondpacon.

Honfan



La prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo parolas en la Festo.



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V.” sendu al:

Nicola Minnaja,
Viale Giulio Cesare 223, ROMA, Italujo

14a INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO

La 14-a Internacia Junular-Kunveno de TEJO fariĝis **oficiala antaŭkongreso** de la 43-a Universala Kongreso de Esperanto.

Partopreno de plenkreskuloj

Nejunaj esperantistoj, loĝantaj en hoteloj, gastejoj aŭ privataj ĉambroj kaj manĝantaj en hoteloj, gastejoj aŭ restoracioj, povos partopreni la aranĝojn de la 14-a IJK (inkluzive la tuttagan ekskurson) je kotizo de 27,— gmk. Detalaj informoj pri tia loĝado estas riceveblaj kontraŭ internacia respondkuponon ĉe la 14-a Internacia Junular-Kunveno de TEJO, Homburg-Saar (Germanujo).

Invito al la 14-a IJK

Ĉe la eliro de la ebenajo de Kaiserslautern, en la iama Palatina parto de la hodiaŭa Sarlando, situas en bela pejzaĝo la subdistrikta urbo Homburgo. Ĝi nombras ĉirkaŭ 26.000 enloĝantojn. En la jaro 1958 ĝi festas la 400-jaran jubileon de sia urbiĝo. Sian urbiĝon ĝi dankas al batalkapabla fortkastelo transformiĝinta pli poste en fortikaĵon, kiu kontrolis la gravajn trafikstratojn inter oriento kaj okcidento.

Stratoj kaj fervojlinioj de Majenco, Mannheim, Karlsruhe, el la Hunsrück,

Trier, Metz kaj Sarreguemines kuniĝas en Homburgo.

La urbo kunligas la Sarlandan karbo-kaj ferregionon kaj la arbaran kaj vinan regionon de Palatinujo. Oni do ne miras pri la fakto, ke en la periferio de la urbo estiĝis grandaj entreprenoj de la plue prilaboranta industrio, kies diversaj produktoj estas sendataj en preskaŭ ĉiujn landojn de la mondo.

Malgraŭ siaj gravaj industri-entreprenoj Homburgo ne estas nura industria urbo. Ĝi estas ĉirkaŭata de altaĵoj kaj de arbaroj, de herbejoj kaj de kampoj.

Sur la „Kastelmonto” moderna hotelo anstataŭas la malnovan fortikaĵon. Inter ruinoj estiĝis vidinda parko, kiu per ĉarmaj vojoj malfermas aliron al la belegaj arbaroj de la Karlsberg. Idiliaj lagetoj kaj la ruinoj de la iam pompaj kastelkonstruaĵoj interrompas la trankvilon de la refreŝiĝema migranto.

En tiun belan urbon mi plej kore invitas Tutmondan Esperantistan Junularan Organizon. La urba subĉiela naĝejo kaj la arbara stadiono estas je via dispono.

Krom tio ni faros ĉion por agrabligi vian restadon en Homburgo kaj por malfermigi al vi tiun regionon, kiu ludis ofte gravan rolon en historio kaj politiko.

Ziegenbein, Urbestro de Homburgo

INTERNACIA SEMINARIO DE GERMANA ESPERANTO JUNULARO

En la komforta kaj moderna junulargastejo de Majenco disvolviĝis de la 26-a de decembro 1957-a ĝis la 1-a de januaro 1958-a la Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, kiun partoprenis 43 gesamideanoj, grandparte gejunuloj, el 7 landoj (Francujo, Okci-

denta Germanujo, Orienta Germanujo, Italujo, Svedujo, Svislando kaj Usono), ankaŭ danke al malavara subvencio de la interna ministerio de Germana Federacia Respubliko, kiu permesis rimarkinde malaltan kotizon.

La Seminario havis kiel temon la eko-



Grupo de partoprenintoj en la Internacia Seminario.

nomiajn, kulturajn kaj politikajn demandojn kunligitajn kun la unuiĝo de Eŭropo, kaj tiu temo estis detale traktata en la prelegoj kaj en la diskutoj, kiuj sekvis la prelegojn kaj kiujn la prelegintoj mem gvidis. La solena malfermo okazis en la ĉeesto de la urbestro de Majenco, s-ro Stein, kiu honoris la partoprenantojn per prelego pri la rolo de la komunumoj en la unuiĝo de Eŭropo, parolado tiom pli valora, ĉar la komunumo de Majenco estis unu el la unuaj en Eŭropo kiuj komencis interŝtatajn rektajn kontaktojn kun aliaj komunumoj sub formo de vizitoj, interŝanĝovojaĝoj, ktp., kaj la eminenta preleganto substrekis la valorajn spertojn akiritajn. D-ro Herrmann jetis ĝeneralan, sed ne pro tio supraĵan superrigardon al la paŝoj faritaj de Eŭropo sur la vojo al unuiĝo, kaj lian prelegon kompletigis d-ro Michael Schmidt el Konstanz kaj Nicola Minnaja el Romo, kiuj parolis respektive pri la komuna merkato kaj Eŭratomo; krome Gian Carlo Fighiera el Torino raportis pri la libereco de informado en Eŭropo, s-ro Janoschka el Heidelberg pri la interpretaj sistemoj uzitaj, uzataj kaj uzotaj, kaj Günther Becker el Sarlando pri la rolo de instruado en la unuiĝinta Eŭropo.

Sed la programo ne limiĝis al la studado de Eŭropaj problemoj, kvankam tiu ĉi estis la ĉefa temo. Oni ekzamenis ankaŭ kelkajn demandojn de la esperantista movado, precipe inter la junularo, en vigla diskutado, kiun gvidis Richard Reuchlin por branĉo informado, Günther Becker por branĉo instruado kaj Nicola Minnaja por branĉo grupa vivo.

Ne mankis distraj aranĝoj, kulminintaj en la granda Silvestra balo, dum kiu la seminarianoj per raketeksplozoj salutis la alvenon de la nova jaro; okazis ankaŭ vizito al la urbo kaj ekskurso al Wiesbaden, ĉi lasta dankenda al la simpatia interesiĝo de s-ro Schönrich.

Ĉi tiu seminario prezentis ankaŭ du bonegajn okazojn por propagando. Unue ĝi estis vizitata de Sudokcidentgermana Radio, kiu dediĉis al ĝi kelkajn minutojn en unu el siaj dissendoj pri aktualaj; tiuj minutoj estis parte dediĉitaj al intervjuoj, parte al la aŭdigo de Esperantaj kantoj. Due okazis diskutvespero kun la reprezentantoj de la junularaj asocioj de Majenco, speciale invititaj; en tiu vespero estis unue projekciita la filmo pri la Universala Kongreso en Marsejlo, kaj poste okazis libera diskuto pri la internacia interkompreniĝo de la junularo. La sukceso estis granda, precipe pro la seriozeco de la parolintoj, pro la trafaj enkondukaj vortoj de Richard Reuchlin, pro la lerta provleciono de Günther Becker, pro la konciza sed ekzakta interpretado de s-ro Janoschka. Pri la afero raportis la lokaj ĵurnaloj. Mi kuraĝas aserti, ke en niaj renkontiĝoj neniam devus manki tiaj diskutoj, gvidataj de kompetentaj personoj (certe tia estis la prezidanto de la diskuto, s-ro Juli), kaj kun unu lerta interpretisto el Esperanto en la koncernan nacian lingvon kaj inverse.

Mi volas ankoraŭ reliefigi, ke la kun-

veno okazis en plene harmonia spirito, kaj, kvankam kelkaj ĝuemuloj ne sukcesis konvinkiĝi, ke en junulargastejo oni ne rajtas fumi, nek alkoholi, nek enlitiĝi malfrue, la amuziĝo ne mankis. La vivo daŭre disvolviĝis en internacia medio, kaj dum la tuta tago la partoprenantoj havis okazon bone interkonatiĝi, en la junulargastejo... aŭ en proksimaj drinkejoj.

La Estraro de Germana Esperanto-Junularo estas kore gratulinda pro la iniciato, kaj estas varma espero de ĉiuj partoprenintoj (al kiuj TEJO sendis raporton de la aranĝo por rememoro), ke tiaj altnivelaj renkontiĝoj ofte ripetiĝu. Al la senlaca organizinto Richard Reuchlin kaj al liaj proksimaj kunlaborantoj Günther Becker, Johannes Radam, Waltraud Mork kaj Helmut Walter flugas la danko de TEJO por la organizo de la spertinda kunveno.

N. M.

LA SKIRESTADO DE DE ESPERANTO-JUNULARO DE SVISLANDO

Nia skirestado 1957-58 denove bonege sukcesis. La suno senĉese brilis, kaj la neĝo permesis agrablan skiadon sur la belaj skiejoj de Adelboden. Nia kabano ideale konvenis al nia grupo de dudek gejunuloj. Ĝi enhavis du kuirejojn, unu grandan manĝejon, tri litĉambrojn por la junulinoj kaj du dormejojn por la junuloj. Ĝi estis multe pli komforta ol tiu de la lasta vintro kaj plene plenumis ĉies dezirojn de junaj sportistoj.

Ni preskaŭ ĉiutage piknikis en la alpaj restoracioj bruniĝante en la suno. Supo alportis al ni varmon. Vere estis tie belegaj horoj de ridado kaj babilado.

La kurso de Esperanto tre interesis la partoprenintojn, kies scio pri nia lingvo estis treege malvasta. Ili ĉefe miris pri ĝia belsoneco, ĝia disvastiĝo kaj facileco, kaj ĉiuj iom post iom komencis uzi Esperantajn vortojn dum la diskutoj. Du esperantistoj vizitis nin: la prezidanto



La novjara nokto en la kabano.

de la Berna Societo kaj iu nederlandano hazarde renkontita en la ĉefa strato de Adelboden. Tiuj du vizitantoj feriantaj en Adelboden konvinkis plurajn partoprenintojn pri la seriozeco de niaj diroj. Ni ne nur lernis Esperanton, sed multe kantis, ludis, dancis kaj festis: estis Novjaro kaj Epifanio.

Tiu skirestado alportis, kiel lastjare, novajn freŝajn fortojn al nia Esperanto-Junularo, kaj tio ĉefe dank' al kelkaj simpatiantaj gazetoj kiel „Coopération” kaj „L'Essor”, kiuj senkoste propagandas por nia laboro.

Venontan vintron denove okazos sama manifestacio en la sama kabano. Do se esperantistoj intencas ferii en svisa skistacio, ili nur venu al Adelboden, kaj tiel ni povos nin renkonti!

Esperanto-Junularo de Svislando

RAPORTO PRI LA 3-a TEJO-SKIFERIO EN TAUPLITZ (AŬSTRUJO)

Denove (kiel en la lastaj jaroj) la dubemuloj diris al si: „Ne estas neĝo, mi restas hejme!” Kaj fakte dum la tuta vojaĝo al nia skiloko ni apenaŭ vidis neĝon, sed, kiam ni alvenis al Tauplitz, ĉirkaŭis nin la sopirita blanko. Alvenis la 10 aliĝintoj el 4 landoj kaj ĉiuj sciivolis pri sia dektaga hejmo, kaj — ĉiuj estis surprizitaj: ni loĝis en vere romantika kabano, nur dek minutojn de la vilaĝo kaj tamen ĉirkaŭita de silenta arbareto.

La tagoj donis multe de ĝojo sur la skioj, kaj la vesperoj agrabliĝis per amika kunesto, per dancoj, kantoj, ludoj k.a.: ĉiu ja konas la agrablan atmosferon regantan en internacia junulara mondo esperantista. Ne mankis la kulturaj kaj organizaj diskutoj karakterizaj por la TEJO-aranĝoj. La lastan tagon estis aranĝita en du grupoj la 1-a TEJO-Skikonkurso kun disdono de validaj diplomoj kaj malgrandaj premioj. La 1-an premion ĉe la progresintoj gajnis Frank Giessner el Braunschweig (Germanujo). La anoncitaj fota kaj pentra konkursoj ne estis efektivigitaj pro manko de mono

kaj de konkursantoj. Tamen Yvette Debernardi (Francujo) ricevis agnoskan premieton pro siaj desegnaj studoj.

Tre gravaj estas la decidoj faritaj post la organizaj diskutoj:

1. La TEJO-Skiferio estu memkomprenebla ĉiujara aranĝo samkiel la IJK.
2. La organizado de la Internacia Skiferio (ISF) havu la saman propagandan subtenon kiel la IJK. Ankaŭ pri ĝi aperu jam ek de somere regule la (almenaŭ mallongaj) sciigoj en „La Juna Vivo” kaj en la junularaj partoj de la landaj revuoj.
3. La TEJO-Skikonkurso klopodu fariĝi grava aranĝo de la junulara skisporto internacia.
4. La 4-a ISF kun la 2-a TEJO-skikonkurso okazu en tempo de la 26-a de decembro 1958-a ĝis la 4-a de januaro 1959-a (pli longa resto eblos) en Aŭstrujo. (Tre verŝajne ĝi okazos laŭ ĝenerala deziro ree sur Felseralp en la montaro Radstätter Tauern ĉe Radstadt, Salzburg; la prezo ne estas pli alta ĉijare, eble malpli alta).
5. Dum la IJK estu disdonataj pere de TEJO multobligitaj aŭ presitaj invititoj por la ISF enhavantaj ĉiujn necesajn detalojn pri aliĝo ktp. Se eble oni disdonu tiajn invitilojn ankaŭ dum la Universalaj Kongresoj.

Fine de tiu ĉi raporto, karaj gelegantoj kaj skiamikoj, mi kore invitas vin al preparo por la partopreno en nia venonta ISF sur Felseralp.


Heinrich Reiter, ISF-gvidanto

MALLONGAJ INFORMOJ

● La brita sekcio de Skolta Esperantista Ligo festas ĉijare sian 10-jaran jubileon. Dum ĉi tiuj 10 jaroj estis membroj de la sekcio dum minimume unu jaro 91 geskoltoj. La sekcio laboris por diskonigi SEL-on inter la britaj geskoltoj kaj ĝian organon „La skolta mondo”. La sekcio organizis kunvenojn en la lastaj 4 jaroj dum la britaj Esperanto-kongresoj kaj sukcesplenan renkontiĝon ĉe la lasta jamboreo; la venonta kunveno okazos dum Pasko en Edinburgo ĉe la brita Esperanto-kongreso.

● „The British Esperantist”, organo de Brita Esperantista Asocio, havas nun junularan paĝon redaktatan de s-ro W. J. Nesbitt. La bulteno de la Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj donas liston de 18 lernejoj, kie oni instruas Esperanton, aŭ en normalaj lernohoroj aŭ en specialaj, al proksimume mil lernantoj. Brita Esperanto-Asocio havas ĉirkaŭ 100 junajn membrojn; ili havos sian kunsidon dum la brita Esperanto-kongreso en Edinburgo la 5-an de aprilo.

● En Moskvo estas fondita junulara grupo esperantista „Fajrero”. Ĝi ellaboris sian programon kaj posedas propran adreson, nome: Moskvo K-9, poŝtkesto 1253, „Esperanto-junulara grupo Fajrero”.



Dancoj antaŭ la kabano de Hahnenmoos. Frostas terure forte!

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de februaro 1958.

N-ro 302

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de januaro kaj ankaŭ por komparo, je la fino de januaro 1957:

	1957	1958
Asociaj membroj	3498	4112
Individuaj membroj		
MJ	405	323
MA	2833	2400
MS	448	327
Pat.	4	5
DM	296	295
HM	52	45
JMJ	3	7
JMA	30	42
	<u>4071</u>	<u>3444</u>
	7569	7556

DELEGITOJ

Argentino

San Nicolás (Buenos Aires) D: S-ro Iberio Mindoro, Rodriguez, oficisto, Leandro N. Alem 108.

Aŭstralio

Wynnum (Queensland) FD (Katolikismo): Vakas.

Aŭstrujo

Graz (Steiermark) FD (katolikismo): Vakas.

St. Veit D: Vakas.

Wien FD (farmacio): Vakas.

Brazilo

Itabuna (Bahia) D: S-ro Inê. Nid Dutra d'Amorim, civila inĝeniero, Poŝtkesto 945, Salvador.

Salvador (Bahia) FD (instruado): F-ino Vivaldina Caymmi, profesora-instruistino, Felipe Camarco 22.

Salvador (Bahia) FD (kristanismo): S-ro Godofredo de Araujo Goes, emerita oficiro, Poŝtkesto 945.

Salvador (Bahia) FD (tramtrafiko): S-ro Onias Almeida, oficisto, Rua Feira de Santana 2.

São Miguel Paulista (São Paulo) D: S-ro Oswaldo, Pires de Holanda, publika oficisto, Caixa Postal 100.

Bulgario

Sofia FD (kristanismo): Vakas.

Ĉeĥoslovakujo

Oborište (Ĉeĥy) D: S-ro Karel Kraft, instruisto, nro 100.

Prostejov (Morava) FD (kristanismo): S-ro Antonín Jandík, paroĥestro de ĉsl. eklezio, Palackého tr. 15.

Danlando

København FD (arto): S-ino Marie Carlsson, eks-librotenistino, Mathilde Fibigersvej 19 II.

Finnlando

Alavus (Vaasan lääni) D: Vakas.

Helsinki-Töölö (Uudenmaan Lääni) FD (elektrotekniko): Vakas.

Francujo

Bar-le-Duc (Meuse) D: Vakas.

FD (skoltismo): Vakas.

Boulogne-Billancourt (Seine) FD (radio-teknikisto): S-ro Maurice Feneyrol, agento teknika pri radio, 26 bis Rue des Peupliers.

Le Mans D: Vakas.

Nice (A.M.) FD (juro): S-ro Michel Raffi, advokato, 6 rue de la Terrasse.

Germanujo

Bad Hersfeld (Hessen) D: S-ro Richard Hirsch, komercoficisto, Unter den Stiegel 27.

Velbert (Nordrh.-Westfalen) D: Vakas.

Hispanujo

Els Bruchs (Barcelona) FD (turismaj aferoj): Vakas.

Sabadell (Barcelona) FD (muziko): Vakas.

Italujo

Bologna (Emilia) FD (muziko): F-ino Rose Maudente, profesorino-diplomita muzikinstruistino, via Belmeloro no. 7.

Fossano (Cuneo) D: S-ro Raffaele Morra, industria oficisto, via Roma 56.

Livorno (Toscana) FD (skoltismo): S-ro Piero Stoduti, instruisto, via E. Zola 93.

Izraelo

Jerusalem FD (grafiko): Vakas.

Jugoslavio

Novi Sad (Vojvodina) FD (virinaj aferoj): S-ino Elizabeta Harangozo, dommastrino, Matice Srpske ul5.

Subotica (Vojvodina) D: Vakas.
FD (matematiko kaj fiziko): Vakas.

Libano

Beirut FD (medicino): S-ro Faruk Said Abuzzahab, studento de medicino, American University Hospital.

Nederlando

Appingedam (Gr.) D: s-ro Jakob Boer, skribisto kaj abelbredanto, Opwierdenweg 26.

Schoonoord (Dr.): D: Vakas.

Veldhoven (N.-Br.) D: Vakas.

Novzelando

Wellington D: S-ro Stanley Robert Perfect, ĉefteknikisto de telefonio, Box 2371.

FD (hospital-aferoj): S-ro James T. Allan, hospital-oficisto, 12 Lonsdale Crescent.

FD (plastikajoj): S-ro Andrew Hornblow, fabrikisto, c/o Apex Plastics, 70B Riddiford Str.

FD (poŝt- kaj telegrafaj aferoj): S-ro Walter Josephy Donovan, poŝt- kaj telegraf-oficisto, 57 Central Ic Kelvinburn.

FD (psikologio): S-ro Cyril John Adcock, docento, Victoria Universitato, Box 196.

FD (telefonio): S-ro Stanley Robert Perfect, ĉefteknikisto de telefonio, Box 2371.

Pollando

Warszawa FD (ĵurnalismo, literaturo): S-ro Jerzy Uspienski, redaktoro, ul. Mokotowska 3m. 39.

Wroclaw VD: S-ro Mikolaj-Bogdan Babiak, librotenisto, Matejki 11/7.

FD (literaturo): S-ro Jerzy Grum, studento, ul. Matejki 16 m 8.

Svislando

Genève FD (stenotipio): Vakas.

Usono

Pacoima (California) D: S-ro Raymond Staples, tabelisto de aeroplanpartoj, 13226 Bromwich Street.

San Francisco (California) VD: S-ro Dirk M. Brink, monŝanĝisto, P.O. Box 935.

FD (monŝanĝaj-aferoj): La VD.

PATRONOJ 1958

- 3 Domingues, D-ro C., Rio de Janeiro, Brazilo.
 4 Brown, S-ro Arthur, São Gabriel, Brazilo.
 5 Beck, S-ro A. K., Sevenoaks, Britujo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

- Abreu, D-ro Modesto Belmonte de, Santa Marie, Brazilo.
 Corral, S-ro Angel, Buenos Aires, Argentino.
 Dodson, S-ro H., Willaston, Britujo.
 Henneberg, D-ro Theodor, Kamen, Germanujo.
 Mamarot, S-ino Cécile, Lyon, Francujo.
 Marmou, Frato René Jean, La Houssaye en Brie, Francujo.
 Molera, S-ro Ramon Pedrals, Moyá, Hispanujo.
 Perra, F-ino G., Lyon, Francujo.
 Vincent, S-ino, Les Andelys, Francujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1957

- 661 Jung, S-ro Teo, Scheveningen, Nederlando.
 662 Ješić, S-ro Slobodan, Niš, Jugoslavio.

MEMBROJ SUBTENANTOJ 1958

- 191 Jelenc, S-ro Fédor, Alger, Alĝerio.
 192 Banham, S-ro F. R., Essendon, Aŭstralio.
 193 Collier, S-ro John, Newdegate, Aŭstralio.
 194 Grahovac, S-ro Ilja, Melbourne, Aŭstralio.
 195 Hehir, S-ro Corn. Patr., Kalgoorlie, Aŭstralio.
 196 Taylor, S-ro Frank V., Albury, Aŭstralio.
 197 Schmidt, S-ro Anton, St. Andra, Aŭstrujo.
 198 Bernaerts-Toussaint, S-ino L., Antwerpen, Belgujo.
 199 Degryse, S-ro André, Roeselare, Belgujo.
 200 De Mot, S-ro René, Uccle, Belgujo.
 201 Geers, S-ino Blanche, Antwerpen, Belgujo.
 202 Staes, S-ino Elly, Koekelberg, Belgujo.
 203 Shanks, S-ro J., Hamilton, Bermudo.
 204 Albuquerque, D-ro José J. de, Macoió, Brazilo.
 205 Almada, S-ro Francisco de S., São Paulo, Brazilo.
 206 Amorim, D-ro Nid Dutra d', Salvador, Brazilo.
 207 Arantes, S-ro Hermes, Igarapava, Brazilo.
 208 Araujo, F-ino I. Baggi de, Rio de Janeiro, Brazilo.
 209 Araujo, S-ro B. Colect, Rio de Janeiro, Brazilo.
 210 Augusto, S-ro O., Barra Mansa, Brazilo.
 211 Bondarovsky, S-ro Elias, Barra Mansa, Brazilo.
 212 Bondarovsky, S-ro Samuel, Barra Mansa, Brazilo.
 213 Braga, S-ro I. Gomes, Rio de Janeiro, Brazilo.
 214 Carvalho, S-ro Elmano Mor. de, Caratinga, Brazilo.

- 215 Caymmi, F-ino Viv. de M., Salvador, Brazilo.
 216 Costa, S-ro Alfonso, Belo Horizonte, Brazilo.
 217 Costa, S-ro Francisco F. da, Rio de Janeiro, Brazilo.
 218 Coutinho, D-ro Luiz de Azeredo, Belo Horizonte, Brazilo.
 219 Dionísio, S-ro Carlos H., São Leopoldo, Brazilo.
 220 Falcão, S-ro Francisco, Belem, Brazilo.
 221 Freitas, S-ro Odegar Dy Araujo, Alagoinhas, Brazilo.
 222 Góes, S-ro Godofredo de Araujo, Salvador, Brazilo.
 223 Knoedt, S-ro Leopoldo Henr., Salvador, Brazilo.
 224 Moreira, S-ro José, Rio de Janeiro, Brazilo.
 225 Neves, S-ro Divino, Boa Esperança, Brazilo.
 226 Nogueira, S-ro Walter José, Rio de Janeiro, Brazilo.
 227 Nunes, S-ro E. Pereira, São Paulo, Brazilo.
 228 Pádua, S-ro Coronel Geraldo, Copacabana, Brazilo.
 229 Palmério, F-ino Maria D., Uberaba, Brazilo.
 230 Pauluk, S-ro José, Londrina, Brazilo.
 231 Peccioli, S-ro Italo, Jaú, Brazilo.
 232 Pinto, S-ro José Dias, Santo André, Brazilo.
 233 Real, S-ro Pedro, Paranavai, Brazilo.
 234 Reuben, S-ro Reinaldo, Belo Horizonte, Brazilo.
 235 Santos, S-ino Z. C., Teofilo Otoni, Brazilo.
 236 Silva, F-ino Heloisa Pereira, Teofilo Otoni, Brazilo.
 237 Silva, S-ro Wladmir S., Rio de Janeiro, Brazilo.
 238 Teixeira, S-ro D., Belo Horizonte, Brazilo.
 239 Verde, D-ro D. Lima, Limoeiro do Norte, Brazilo.
 240 Villa, S-ro Thomas T., Recife, Brazilo.
 241 Wehrs, F-ino E., Niteroi, Brazilo.
 242 Aitchison, S-ro George R., Great Houghton, Britujo.
 243 Atkinson, S-ro W. G., Worcester Park, Britujo.
 244 Bachmann, S-ro S. P., Hove, Britujo.
 245 Barry, S-ro J., Sutton, Britujo.
 246 Beaumont, S-ro B. B., Fartown, Britujo.
 247 Bowell, F-ino Barbara, Cromhall, Britujo.
 248 Clarke, S-ro W., Dunfermline, Britujo.
 249 Edmondson, S-ino E., Bingley, Britujo.
 250 Fraser, F-ino G. R. M., Ilford, Britujo.
 251 Goulding, S-ino Eva, Blackburn, Britujo.
 252 Hanson, S-ro C. G., Devon, Britujo.
 253 Knight, S-ino E. B., London, Britujo.
 254 Laurie, S-ro E. Jackson, Bournemouth, Britujo.
 255 Laurie, S-ino W., Bournemouth, Britujo.

- 256 McDonald, S-ro R. J., Gloucester, Britujo.
 257 Middlemast, S-ro Arthur H., Bournemouth, Britujo.
 258 Millidge, Patro R. G., Sutton, Britujo.
 259 Phelan, S-ro H. K. Old Bexley, Britujo.
 260 Relf, S-ro E. F., Addlestone, Britujo.
 261 Saft, S-ro S., Salford, Britujo.
 262 Seddon, S-ino R., Southport, Britujo.
 263 Sinclair, F-ino P. C., Buckhaven, Britujo.
 264 Sly, S-ro Kenneth A., Letchworth, Britujo.
 265 Williams, S-ro Norman, Manchester, Britujo.
 266 Zeiner, S-ro B. R., Barry, Britujo.
 267 Beliard, S-ro Luc, Nantes, Francujo.
 268 Buchet, S-ro M., Tassin, Francujo.
 269 Delahaye, S-ro I., Petitville, Francujo.
 270 Joly, S-ro A., Besançon, Francujo.
 271 Julien, S-ro M., Aix, Francujo.
 272 Lemonnier, F-ino Germaine, Asnières, Francujo.
 273 Llech-Walter, F-ino Colette, Perpignan, Francujo.
 274 Llech-Walter, S-ro R., Perpignan, Francujo.
 275 Motto, S-ro Roger, Avignon, Francujo.
 276 Petit, S-ro P., Rosny-sous-Bois, Francujo.
 277 Poly, S-ro P., Paris, Francujo.
 278 Prud'hon, S-ro G., Fontenay s/Bois, Francujo.
 279 Télémécanique, la Groupe T.S.C., Nanterre, Francujo.
 280 Yelland, S-ro E. E., Aspremont, Francujo.
 281 Barkhausen, S-ro Heinz, Bremen, Germanujo.
 282 Böcker, S-ro H., Gelsenkirchen, Germanujo.
 283 Concelaar, F-ino A., Wattenscheid, Germanujo.
 284 Doering, F-ino Johanna, Berlin, Germanujo.
 285 Fritsch, D-ro Erdmann, Clenze, Germanujo.
 286 Hering, S-ro A., Nürnberg, Germanujo.
 287 Lamprecht, D-ro Hermann, Essen, Germanujo.
 288 Oeste, S-ro Wilhelm, Th., Köln, Germanujo.
 289 Schneider, S-ro Franz, Marsberg, Germanujo.
 290 Wilke, S-ro Harry, Berlin, Germanujo.
 291 Alberich, S-ro S. Jofre, Barcelona, Hispanujo.
 292 Martin, S-ro Julián Arroyo, Oviedo, Hispanujo.
 293 Pastor, S-ro A. Zarraonandia, Bilbao, Hispanujo.
 294 Bonomi, D-ro Poalo August, Verona, Italujo.
 295 Lacalendola, Prof. Adamo, Bari, Italujo.
 296 Minnaia, S-ro L., Roma, Italujo.
 297 Perini, S-ro Gustavo, Belluno, Italujo.

- 298 Roberto, D-ro José Vivas, Napoli, Italujo.
- 299 Worcester, S-ino Doris M., Kameoka, Japanujo.
- 300 Jesic, S-ro Slobodan, Nis, Jugoslavio.
- 301 Ball, S-ro C. R., London, Kanado.
- 302 Llinás, S-ro A. Bellvehí, La Laguna, Kanariaj Insuloj.
- 303 Rousseau, S-ro Henri, Rabat, Maroko.
- 304 Bink, F-ino A. B. M., Rotterdam, Nederlando.
- 305 Woessink, S-ro E. J., Arnhem, Nederlando.
- 306 Bugge-Paulsen, Kapt. R., Oslo, Norvegujo.
- 307 Reisaeter, S-ro Trygve, Odda, Norvegujo.
- 308 May, S-ro Johannes, S. Wendel, Sarlando.
- 309 Brink, S-ro Dirk, San Francisco, Usono.
- 310 Duncan, S-ro Thomas, Brookline, Usono.
- 311 Eisele, S-ro J., St. Louis, Usono.
- 312 Moline, F-ino Ruth L., Tacoma, Usono.
- 313 Simon, Werner, Memphis, Usono.
- 314 Simpson, S-ro W. P., Harrisburg, Usono.

DONACOJ AL LA ĜENERALA KASO

J. R. Pfanner, Svislando, 4.50 gld.;
F-ino C. Zorgdrager, Nederlando 5.—
gld.; F-ino J. Doering, Germanujo, 6.16
gld.; J. H. Murray, Usono, 19.— gld.

DONACO POR OFICEJA ILARO

F-ino C. Zorgdrager, Nederlando,
5.— gld.

FONDAĴO-ZAMENHOF

Antaŭa sumo: 622.75 gld. Novaj kon-
tribuoj: J. Guillaume, Francujo, 8.30 gld.;
H. V. Rasmussen, Danlando, 5.46 gld.;
Prof. J. Beau, Francujo, 12.45 gld.; A.
Nikolajevič, Jugoslavio, 2.— gld. En-
tute 650.96 gld.

Koran dankon al la donacintoj.
Ĉiu esperantisto kontribuu!

NOVAJ PREMIOJ EN KONKURSO MS

Ankaŭ en la dua kaj tria centoj da MS
1958 jam falis la premioj sur feliĉajn
kapojn. La sorto indikis la numerojn 192
kaj 259, apartenantajn al resp. S-ro F.

R. Banham, Aŭstralio, kaj S-ro H. K.
Phelan, Britujo. Ambaŭ sinjoroj rajtas
elekti libron en valoro de 10.— n. gld.
(£.—.—).

S-ro Banham estas fidela membro de
la Asocio, jam de pli ol 20 jaroj. Li
estas unu el la tradukintoj de la ĵus
aperinta verko Angla Antologio, eldon-
ita de U.E.A. S-ro Phelan estas membro
jam pli ol 10 jarojn kaj, same kiel S-ro
Banham, de multaj jaroj helpanta la
Asocion per sia MS-kotizo.

Dankon kaj gratulon al ambaŭ merit-
plenaj membroj. Kiu sekvos ilin? Altigu
vian membro-kategorion al MS kaj parto-
prenu la konkurson!

M. H. VERMAAS,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Koresponda Serva Mondskala. Nun-
tempe, multaj adresoj haveblaj el Esto-
nio, Francujo, Pollando, Japanujo, Jugo-
slavio, Bulgario. Skribu indikante viajn
seksan, aĝon, profesion al Daniel Luez,
Laon (Aisne), Francujo (kaj enmetu res-
pondkuponon por ĉiu petata korespond-
anto).

Por restarigo de esperantista lernejo ni
bezonas a) infanojn, b) domon, c) mo-
non. Ni malsukcesis nur pro manko de
infanoj, kiujn ni nun serĉas unuavice.
Grupoj kaj fakasocioj, diskutu kaj skribu
al S-ro Smith, Hilltop Farm, Brighton
Road, Crawley, Sussex, Britujo.

„La Vivo kaj Koncepto de la Societo de
Amikoj”. Sendu kvar respondkuponon
al la Sek K.E.S., Jessie Saunders, Sydney
Lodge, Bath Road, Ventnor, I.W. An-
glujo.

La plej granda vesperjurnalo de Svedujo
„Aftonbladet” publikigas senpage kores-
pondpetojn de eksterlandanoj. Indiku
aĝon, seksan, deziratan korespondtemon!
Adreso: Ett ögonblick redaktörn, Afton-
bladet, Vattugatan 12, Stockholm 1,
Svedujo.

Leteresperon ni aranĝos la 28-an de
aprilo 1958 por instigi niajn membrojn
korespondi kun eksterlandaj samideanoj.
Adresu al F-ino E. Bernard, Sekretariino
de la Esperanto Societo „PACEN”,
Vreewijkstraat 27, Leiden, Nederlando.

Serĉas kontakton (fotojn, stampojn) pri
Ruĝa Kruco-konferencoj 1899—1928 en
Holando, 1919 en Paris. Rilatoj pri pro-
blemoj de la indiĝenoj en Azio/Afriko.
E. Anderegg-Gurtner, Horn/Bodensee,
Svislando.

Turka filatelisto deziras inteŝanĝi seriajn
poŝtmarkojn kun samideanoj tutmonde.
Sahap Kuli komercisto Posta caddesi
Egehan 34, Ankara, Turkio.

Korespondantoj bonvolu noti! La adreso
de S-ino Doris M. Worcester de Lon-
dono, post la 24-a de januaro 1958,
estos ĉe „OOMOTO”, Kameoka, Kyoto-
fu, Japanujo.

12 gekursanoj deziras korespondi tut-
monde. Respondo certa. Skribu mult-
nombre (let. aŭ p.k.) al: L. Bondeson,
Skogsby, Olofström, Svedujo.

Belga junulo, teknika universitatano
(18 j.) deziras korespondi kun la tuta
mondo pri ĉio. Robert Dossche, Stroo-
kotwijk 70, Roiselede/Doomkerke, Bel-
gujo.

30-jaraĝa teknika oficistino Eva Bicen-
cová, Alešova 8, Plzen, Ĉeĥoslovakio,
deziras inteŝanĝi modajn viringazetojn
kaj revuojn tutmonda, precipe kun okci-
dentaj landoj. Interesiĝas ankaŭ pri
moderna kuirado. Korespondas angle kaj
en Esperanto.

Leteresperon aranĝos grupo por festi
unuan datrevenon je la unua de majo.
Respondo garantiata. Esperanta Klubo,
The Heavitree Social Centre, Wingfield
Park, Exeter, Britujo.

M. D. Metev, Aprilovo, Gabrovska,
Bulgario, deziras korespondi per il. p.k.
kaj leteroj kun ĉiuj landoj. Nepre res-
pondos.

Krastju Sofroniev, str. Mitropolit, Pana-
ret 20, Plovdiv, Bulgario, deziras kores-
pondi kun gesamideanoj de la tuta
mondo.

Filatelistoj! Se vi sendos 75 vialandajn
pm, mi sendos al vi 75 skandinavajn
pm. Arne Kvam, Bangsund, Norvegujo.

S-ro C. A. Hvorslev, eksinstruisto, del.
U.E.A., Asylvej 1, Risskov, Danlando,
inteŝanĝas stampitajn danajn kaj nor-
vegajn P.M. kontraŭ alilandaj. Egalan
kvanton kontraŭ kvanto.

F-ino Borka Nikolovska, Dj. Djakoviĉa
5, Kumanovo, Jugoslavio, deziras kores-
pondi pri ĉiuj temoj. Resp. garantiata.

Malnovan famekonatan francan brandon
Armanjako disvendas s-ano Despeyroux,
reprezentanto, 104 Bd. Poincaré, Garches
(S. & O.), Francujo. Ekspedo en ĉiujn
pagipovajn landojn. Informpetu!

Ĉu vi jam pagis vian kotizon??

Se ne, faru tuj, por ke vi ricevu
la venontan numeron kiu estos
jubilea!

La instituto por internaciaj porinstruistaj kaj por-gejunulaj vojaĝoj en

SALZBURG, Aŭstrujo, Mozartplatz 10

invitas vin al dektaga rondvojaĝo tra Aŭstrujo kaj al vizito Esperantomuzeo en Vieno (Wien), en la tempo ekde la 9a—18a de aŭgusto 1958.

Kolektiĝloko: Salzburg.

Post la vizito de la Mozarturbo Salzburg je la 9a de aŭgusto ni travivos ankoraŭ gajan kuneston ĉe salzburga folklorista grupo kun popolkantoj kaj dancoj.

La rondvojaĝo komencas je la 10a de aŭg. Moderna aŭtobuso veturigos nin tra la regiono de la ravaj salcburgaj lagoj al la urbo Linz/Danubo. Ŝipveturo tra la Danubregiono Wachau.

Tri tagojn ni restos en Vieno, kie ni vizitos ĉiujn vidindaĵojn inkluzive Esp-o-muzeo. Apud la Lago de Neusiedel ni atingos la bordon de la Hungara Malaltebenaĵo. Trans la Pasejo de Semmering ni atingas tra Stirio Karintion (Kelta-roma elfosejo Magdalensberg, Klagenfurt, Lago Wörthersee). Tra la mondfama montvilaĝo Heiligenblut la aŭtobuso veturigos nin trans la alpa strato Grossglockner (2505 m) al la urbo Zell a. See. Vizito de la plej granda energiejo de la Alpoj Kaprun.

Post la reveturo al Salzburg interamikiĝa vespero kun la salcburgaj esperantistoj.

Tutkosto: 160,— DM (germanaj markoj).

La kosto ampleksas veturadon ek de Salzburgo reen al Salzburgo per aŭtobuso kaj ŝipo, plenan pensionon (naŭ transnokiĝoj kaj manĝon trifoje po tage, komencante kun la tagmanĝo je la 1a tago kaj finante je la 10a tago), ĉiujn ekskursojn kaj enirkostojn, krome la enirkostoj por la teatro en Vieno:

Daŭriga restado eblas kontraŭ krompago: por ĉiu tago 10,— DM (germanaj markoj).

Ne forgesibla estas partopreno en internacia esperantista karavano, en kiu vi povas travivi postkongreseton en ĝojiga, instruplena maniero. Vi certe entuziasmiĝos. Aliĝu kiel eble plej baldaŭ, skribante al:

Josef Steppan, Hüttlingen/Württ.

Abtsgmünder Str. 17, Germanujo.

kiu ankaŭ donas al vi pli detalan informon (nepre aldonu respondkuponon!)

Fino de la aliĝo: 1a de majo 1958!

Helsingor



La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos 19.—26. de julio. Prospekto pri ili senpage havebla ĉe

L. Friis - Ingemansvej 9, Aabyhøj, Danlando

La alia projekto estis propono tute aboli ĉiujn vortojn; kaj tion oni subtenis kiel grandan avantaĝon tiel pro la sano kiel pro la mallongeco. Ĉar evidente ĉiu vorto parolata estas ioma koroda foruzo de niaj pulmoj, kaj sekve kontribuas al mallongigo de nia vivo. Oni do proponis rimedon: ĉar vortoj estas nur nomoj de objektoj, estos pli oportune se ĉiuj homoj kunportos ĉion necesan por esprimi la aferon, pri kiu ili interparolos. Kaj certe tiu eltrovo estus realigita, je granda oportuneco kaj sano de la homoj, se la virinoj, kune kun la popolaĉo kaj analfabetoj, ne estus minacintaj, ke ili komencos ribelon se oni ne permesos al ili libere paroli per siaj langoj kiel ĉar iliaj prapatroj; jen kiel la homamaso konstante kaj neŝanĝeble malamikas al la scienco! Tamen multaj el la plej kleraj kaj saĝaj estas adeptoj de la nova plano por esprimi sin per objektoj, kiu havas nur tiun maloportunaĵon, ke, se la aferoj de iu homo estas tre ampleksaj kaj diversaj, li devas porti sur sia dorso proporcie pli grandan faskon da objektoj, krom se li kapablas pagi la helpon de unu-du fortaj servistoj. Mi ofte vidis du el tiuj saĝuloj, preskaŭ premfalantaj pro la pezo de siaj pakajoj, kiel ĉe ni kolportistoj, kiuj renkontiĝante sur la strato, demetis siajn ŝarĝojn, malfermis siajn pakojn, kaj kunparoladis dum horo, poste remetis siajn objektojn, helpis al si reciproke repreni la ŝarĝojn, kaj adiaŭis.

Sed por mallongaj konversacioj, oni povas porti objektojn en la poŝoj, kaj sub la brakoj, sufiĉajn por siaj bezonoj; kaj hejme oni ne trovas malĉifilaĵojn. Tial la ĉambro, en kiu renkontiĝas la adeptoj de tiu ĉi arto, estas plena je ĉiaj objektoj tuj haveblaj, sufiĉaj por doni materialon por tiu artefarita interparolo.

Alia grava avantaĝo de tiu inventaĵo, oni pretendis, estis tio, ke ĝi rolos kiel universala lingvo kompreneble en ĉiuj civilizitaj komunumoj, kies varoj kaj iloj estas ĝenerale samaj, aŭ tre similaj tiel, ke oni facile rekonas ilin. Kaj sekve ambasadoroj povus trakti kun fremdaj reĝoj aŭ ŝtatministroj, pri kies lingvoj ili estus sensciaj.

„VOJAĜO AL BALNIBARBI”
DE JONATHAN SWIFT

EL LA ANGLA ANTOLOGIO

1000 - 1800

Prezo: 10 ned. gld. (40 steloj)

Mendu tuj de U.E.A.

BELGIO

EKSPO 1958

4 komfortegaj ĉambroj lueblaj
en novkonstruita „Vilao Birdkanto”

Ph. van Geit, Lenniksebaan 429, BRUSSEL

(UEA-delegito)

Moderaj prezoj - 15 min. de la urbcentro

Lingvoj parolataj: esperanta, franca, nederlanda, germana, angla. Mendu tuj viajn ĉambrojn!

KULTURA SEMAJNO

kaj Internacia feria restado

De 9—15 julio D.L.E.A. 1958 aranĝos kulturan semajnon en **Husmandsskolen, Odense, Danio**. Kulturaj temoj, belaj ekskursoj, Esperantista kunvivado.

Prezo nur 135,— d.kr.

Petu broŝuron ĉe: Magnus Jacobsen, Rydersvej 9, Århus, Danio. ... kaj vizitu la urbon de

H. C. Andersen.

D.L.E.A.